

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2020. №1



Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2020. №1 (303)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro), Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Povilas Jegorovas, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

Abontarifo por 2020

Abonanto: 15 eŭroj, 17 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 33 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 110 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2020, №1 (303).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 1 апреля 2020 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. La ondo de pandemio kaj la "Ondo"	5
Temo	6
Stanislav Belov. La pandemio kaj la homaro: konkludoj de la viruso	7
Esperantistoj kaj kronviruso	11
Kirilo Brosch. Esperantigo de "coronavirus"	11
Duncan Charters. Mesaĝo al ĉinaj esperantistoj	12
Aleksander Korĵenkov. Malgaja statistiko	12
Donaco de la eldonejo <i>Libera</i>	13
<i>Monato</i> : Senpaga dum la virusa krizo	13
Albert Stalin T. Garrido. Kongreso prokrastita en Filipinoj	14
Peter Baláž. Ankaŭ al E@l minacas nuligo de ĉi-jaraj eventoj	15
Amri Wandel. Israelo: "Ne rajtas kunveni pli ol dek personoj"	16
Hispanio: La landa kongreso prokrastita	17
Orlando Raola, Said Baluĉi. La 52a Malferma Tago ne okazos	17
Intervjuo	18
Paweł Fischer-Kotowski. Carlo Minnaja: dampi la ekscesojn: Intervjuo kun Carlo Minnaja	19
Eventoj	23
Liba Gabalda. La 18a Novjara Renkontiĝo	24
Werner Groen. Mia vojo al Esperanto kaj al la 5a Luminesk'	26
Tyron Surmon. Neĝkovrite en Pollando	27
Reza Kheirkhan. Staĝo en Tajvano: Malgraŭ la korona viruso	29
Lu Wunsch-Rolshoven. Podia diskuto en Munkeno pri lingvoplureco en Eŭropo	30
Nikolao Gudskov. APERo pri jubileoj	32
Ilona Koutny. Arda kaj multkolora interlingvistika sesio en Poznano	34
Aleksander Korĵenkov. Germanio: ruslingve pri Esperanto per televido	35
Povilas Jegorovas. Nova posteno de Vytenis Andriukaitis	36
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Parlamenta medalo por Povilas Jegorovas	36
Povilas Jegorovas. Nova informa kaj instrua projekto en Litovio	37
Aleksander Korĵenkov. La membraro de UEA plu malkreskas	38
Lee Miller. Akademianoj kontrolis lernolibron	39
Szilvási László. Esperantaj reklamkampanjoj en Facebook en Hungario	39
Programo de la Montreala IKU	40
Aleksander Korĵenkov. Montrealo superis Vankuveron	40
Tempoj kaj urboj. 1859. Penza	41
Nekrologoj	42
Koncize (12 informoj)	43

Tribuno	44
Probal Dasgupta. Nia pakto kun la tagiĝo: Eseo	45
Ed Robertson. Fino, aŭ kio?	50
Velentin Melnikov. Legendoj kaj realo de la Moskva metroo	53
Internacia Tago por Elimino de Rasa Diskriminacio	56
Spomenka Štimec. En Zagrebo post la tertremo	56
Roland Rotsaert. Premio Paul Gubbins por Nova Ĵurnalisma Talento	57
Arkivo	58
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en aprilo 2020	59
Aleksander Korĵenkov. Antaŭ 125 jaroj: Lev Tolstoj kaj la unua Esperanta gazeto.	61
Lev Tolstoj. Prudento aŭ Kredo?	64
Edmond Privat. La verko de H. Hodler	67
Kulturo	70
Aleksander Korĵenkov. Pri la ĉefverko de Platonov kaj ĝia stranga lingvaĵo	71
Andrej Platonov. Ĉevenguro. Vojaĝo kun malfermita koro: Romanfragmento (Tradukis el la rusa Aleksander Korĵenkov)	72
Paulo Sérgio Viana. Kurba: Novelo	87
Miĥail Korotkov. Troa tago: Novelo	89
Poezio el ĉiuj ĉieloj 2020	96
Julian Modest. Ina kuraĝo: Novelo	97
Literatura konkurso "Ĥristo Gorov – Ĥrima 2020"	98
Miguel Fernández. Jes, sed alvenos ja la tago: Poemo	99
Aleksander Korĵenkov. Nia libroproduktado en la 2019a jaro	104
Wolfgang Kirschstein. Oskaro kaj la mondo	108
Halina Gorecka. 90 jaroj da plena vivo kun doloroj, sed ankaŭ kun feliĉo (Recenzo: Júlia Sigmond. <i>Júlia Sigmond 90</i>)	111
Carlo Minnaja. El la rusa poezio (Recenzo: <i>El la rusa poezio</i>)	112
Paŭlo Moĵajevo. Albumo pli muzika, ol kanta (Recenzo: Kjara. <i>Blua horizonto</i>)	114
Floréal Martorell. <i>Kien vi iros?</i> : La unua muzika albumo en 2020	116
<i>La Pordo</i> : Nova bita unuopaĵo kaj video de Ale Kosabela	116
Maria Majerczak. Internacia kantokonkurso en Esperanto	117
Novaj libroj en nia biblioteko	118
<i>Literatura Foiro</i> , 2020, №303	120
Internacia Esperanta literatura konkurso ABRITUS	121
Demonstraj versioj de <i>La Ondo</i> por 2017-19	121
Ricevitaj gazetoj	121

La pandemio grave ŝanĝis la homan vivon, sed ĝi ne kapablas ŝanĝi la kalendaron, kaj jam unu monaton en la norda hemisfero daŭras printempo; kaj sur la kovropaĝo de nia printempa almanako estas sezona bildo de Aleksej Savrasov (1830-1897).

La ondo de pandemio kaj la “Ondo”

Pro la koronavirusa pandemio ni devis komplete ŝanĝi la rubrikon “Temo” en nia printempa almanako, kaj vi legos tie multon pri la nova monda plago kaj ĝia efiko al la esperantista aktivado. Ni esperas ke ĉiuj, kiuj legas ĉi tiujn liniojn, estas sanaj kaj legipretaj – ja vin atendas 122-paĝa *Ondo*, la plej ampleksa en nia historio.

Sed unue, iom pli pri la vivo en la novaj kondiĉoj. Nun oni rekomendas limigi eksterhejman aktivadon kaj plulabori hejme, krom la okazoj, kiam la ĉeesto labor-loke estas nepre necesa. Oni sekvu simplajn regulojn:

Regule asepsu viajn manojn per specialaj desinfektaĵoj aŭ lavu la manojn kun sapo dum minimume 20 sekundoj post vizito de publikaj instancoj, vendejoj, neces-ejoj k. s., post rehejmiĝo, antaŭ manĝo, antaŭ kontakto kun la okuloj, buŝo, nazo.

Regule aerumu vian loĝejon kaj purigu ĝin uzante kemiaĵojn.

Tusante aŭ ternante ŝirmu viajn buŝon kaj nazon per papera poŝtuko aŭ kurbigante la kubuton; tuj post la uzo forĵetu la tukon en rubujon kun ŝirmilo kaj asepsu la manojn aŭ lavu ilin kun sapo.

Tenu distancon al aliaj homoj minimume unumetran, precipe, se tiuj tusas, ternas aŭ klare havas febron. Okaze de febro, apero de tusado kaj malfaciliĝo de spirado laŭeble rapide turnu vin por medicina helpo.

Por resti en bona animstato limigu spektadon de novaĵoj kaj surfadon en la sociaj retoj. Legu fidindajn fontojn pri la koronaviruso, ekzemple, de la Monda Organizo pri Sano. Spektu artajn filmojn, teatraĵojn, aŭskultu muzikon. Nepre faru gimnastikon.

En la sekvaj paĝoj vi legos ofertojn de *Monato* kaj *Libera* pri senpagaj legaĵoj. Ankaŭ ni danke al la reto povas proponi kelkajn senpagajn servojn, nome:

Nia novaĵretejo kun pli ol 2000 artikoloj: <https://sezonoj.ru>

Nia virtuala biblioteko: <http://esperanto-ondo.ru/Libro/Libroj.php>

Nia gazeta arkivo: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-old.htm>

Nia podkasto kun pli ol 50 programoj: <http://radio.esperanto-ondo.ru>

Ni povas proponi tiojn, ĉar tiu senpaga materialo estas rezulto de nia laborado redakcia, kiun vi dum jaroj subtenis per aĉetoj kaj abonoj. Ni esperas, ke vi daŭre subtenos *La Ondon de Esperanto*. Malkiel la retejo, kiu plu estas libere legebla de ĉiu deziranto, la almanakon ricevos nur tiuj, kiuj abonos ĝin. Estas tri abonkategorioj:

1. Abonanto – 15 eŭroj; 2. Amiko – 30 eŭroj; 3. Patrono – 100 eŭroj.

Pri la pagomanieroj legu ĉi tie: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La nomoj de ĉiuj amikoj kaj patronoj aperos en la retejo kaj en la almanako (krom tiuj, kiuj preferas resti anonimaj). Ĉiu patrono ricevos diplomon de la redakcio, senpagan bitversion de ĉiu nova libro de *Sezonoj* kaj 50-procentan rabaton por ĉiu nova papera libro.

Bonvolu legi, aŭskulti kaj ... subteni. Sed, plej grave: gardu vin!

Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov

Temo

Bored at home?

Learn Esperanto!

the easy, neutral and international language



La sekcio “Temo” de nia printempa almanako estas dediĉita al la koronavirusa pandemio, kiu plagas ankaŭ esperantistojn, kiuj preskaŭ ĉie perdis siajn klubkunvenojn, renkontiĝojn, kongresojn kaj vojaĝojn. Sed eble dum la nuna kvaranteno iuj neesperantistoj ne enuos, sed rete eklernos nian lingvon?..

La pandemio kaj la homaro: konkludoj de la viruso

de Stanislav Belov



“Se vi longe rigardas abismon, ankaŭ la abismo rigardas vin”, – diris Nietzsche, kies animo la tutan vivon balanciĝis rande de abismo de frenezo kaj fine falis en ĝin. La pandemio de Covid-19 metis la mondon rande de frenezo, kaŭzita de malamiko nevidebla kaj pro tio eĉ pli timiga – la koronaviruso. Kion ĝi pensas pri ni?

La Tero kiel testejo

En sia novelo *Ondoj estingas venton* la fratoj Strugackij priskribis grandan eksperimenton, kiun nekonata ekstertera civilizato faris je la homaro. Ie kaj tie aperis strangaj estaĵoj, kiujn plejparto de la homoj timegis, sed kelkaj konsideris simpatiaj. Per tiu kaj kelkaj aliaj testoj la eksterteranoj elektis homojn, pretajn al rapida plua evoluo – tiel kreiĝis la raso de “ludenoj”.

Mi ne estas adepto de la konspiraj teorioj, do mi proponas pure mensan eksperimenton forme de siaspeca intelekta ludo. Imagu, ke la nuna pandemio estas testo por la homaro, kaj ke iu eksterhomara esploristo (ĉu la viruso mem?) atente studas nian reagon al ĝi. Kion ĝi povas konkludi?

Homoj ignoras la sciencon

“En plua kaj venta tago... mi direktiĝas al la nutraĵa bazono en Guanĝou, la ĉefurbo de la sudĉina provinco Gŭandongo, por serĉi lulilon de novaj patogenoj”. Ĉu vi supozas tion esti raporto de virusologo, sendita de la ĉina registaro kadre de urĝa teamo por estingi la pandemion? Tute ne. Temas pri citaĵo el la libro *Pandemio* de la usona epidemiologo kaj scienca ĵurnalisto Sonia Shah, eldonita en 2016.

Sekvas priskribo de la tipa bazaro, kie estas vendataj kune bestoj sovaĝaj kaj hejmaj, neniam renkontiĝantaj en naturo. La sciencisto, vizitinta ĝin en 2011, de-tale klarigas kiel okazas intermiksiĝo de iliaj patogenoj, naskanta novajn virusojn kiel SARS en 2002. Ŝi klare konkludas: “Se ne formiĝus tia bazo por rapida evoluo de mikroorganismo, verŝajne oni neniam ekparolus pri la problemo de la netipa pneŭmonio”.

Sed ĉu la mondo lernis ion el la sciencistaj avertoj kaj la antaŭaj virusaj eksplodoj? Nenion. Ŝi konstatas, ke post la menciita SARS, timiginta la mondon, tiaj bazaroj estis fermitaj, sed post kelkaj jaroj ili reaperis – foje duonkaŝe, sed ĉie. Oni povus supozi ke temas pri nura koincido, kaj ŝi estis hazarda aŭgurinto. Sed eĉ pli frue, en 2006, alia usona epidemiologo Larry Brilliant enketis opinion de siaj kolegoj kaj konkludis jenon: 90% de la epidemiologoj prognozis dum la vivo de du proksimaj generacioj pandemion, kapablan trafi ĝis miliardo da homoj, mortigi ĝis 165 milionoj kaj kaŭzi tutmondan ekonomian krizon kun perdo de ĝis tri trilionoj da dolaroj. Ĉu iu atentis?

Por preventi tion ne necesis ekstremaj oferoj, kiujn la registaroj urĝe faras nun. Por krei tutmondan avertosistemon sufiĉus sumo egala al 1% de la flugbiletaj kos-toj, pro kio fakuloj eĉ proponis starigi respektivan imposton je tiu industrio kiel la ĉefa disvastiganto de la novaj infektoj. Tamen en 2013 eĉ plej primitiva observado okazis nur en 80 landoj el 193, aliĝintaj al la Monda Organizaĵo pri Sano.

La registaroj ignoris la sciencistajn avertojn antaŭ la pandemio, la civitanoj ignoras ilin nun, amase fuŝante la kvarantenan reĝimon, evitante limigojn kaj dis-vastigante fabelojn pri enigmaj komplotoj, celantaj troigi la danĝeron kaj timigi la homaron. Ĉu vi plu kredas ke la Mezepoko finiĝis kaj la racio venkis la mallumon de malklereco? Mi pli emas kredi al la svisa saĝulo Carl Gustav Jung: “Ekstere la homoj estas pli-malpli civilizitaj, sed interne ili plu estas sovaĝuloj”.

Egoismo superas solidarecon

La evoluaj psikologoj Corey Fincher kaj Randy Thornhill asertas, ke la kulturo naskiĝis danke al epidemioj, kiuj igis la homojn grupiĝi kaj toleri unu la aliajn, kontraŭstarante al eksteruloj – ĉar ĉiu fremdulo estis eventuala portanto de mortigaj virusoj. Ŝajnas ke tiu prahistoria sento plu vivas en la nuntempa homo kaj nur atendas pretekston por riveliĝi.

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa printempa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Esperantistoj kaj kronviruso

La 16an de marto TEJO publikigis en sia retejo alvokon, en kiu ĝi petis, ke homoj sendu video-rakontojn pri la situacio en siaj landoj rilate al la pandemio de la kronviruso Covid-19. Respondis dekoj da esperantistoj el plej diversaj partoj de la mondo. Ili rakontis pri la situacio en siaj landoj, kaj donis konsilojn, kion fari dum la restado hejme. Sed plej grave, esperantistoj donis grandan mesaĝon de espero.

Unu semajnon poste, la 23an de marto la rakontoj estis kunmetitaj kaj aperigitaj ĉe Jutubo https://www.youtube.com/watch?v=2fpM1ci_fMk

Esperantigo de “coronavirus”

Demando

Leviĝis demando pri la ĝusta nomo de la lastatempa viruso el Ĉinujo. Ĉinoj ekuzis “kronaria viruso”, UMEA, la medicinistoj ŝajnas preferi “kronaviruso”, mi, kun la subteno de Vikipedio, proponas “krona viruso” aŭ “kronviruso”.

Respondo

Por la viruso, kiu aperis en Ĉinujo en Decembro 2019 (kaj aliaj virusoj el la subfamilio science nomata “Orthocoronavirinae”), la Lingva Konsultejo de la Akademio de Esperanto rekomendas la formojn (en alfabeto sinsekvo)

“kronaviruso” aŭ “kronviruso”.

La konsultejo samtempe malrekomendas la jam uzatajn formojn “kronaviruso” (kiel facile misanalizeblan) kaj “kronaria viruso” (“kronaria” estas anatomia termino tute sen rilato al la koncerna viruso).

Kirilo Brosch — Cyril Robert Brosch

Direktoro de la Lingva Konsultejo de la Akademio de Esperanto

Mesaĝo al ĉinaj esperantistoj

Karaj ĉinaj esperantistoj,

Dum daŭro de via tradicia printempa festo, Universala Esperanto-Asocio kun 65 fakaj asocioj, inkluzive de la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA), kaj membroj el 130 landoj sekvas zorgeme la situacion de la epidemio de pneŭmonio kaŭzita de la nova koronaviruso en via lando, kaj precipe deziras la sanon de la ĉinaj membroj kaj la esperantistoj en Wuhan. Ni simpatias la malsanulojn infektitajn de la viruso kaj kondolencas pri la mortintoj kaj ties familianoj.

Ni atentis, ke viaj registaroj de la centra ĝis la lokaj, kaj ĉiuj popoloj solidarece, kuraĝe, serioze kaj racie batalas kontraŭ la epidemio. Ni ankaŭ rimarkis la klopodojn de la ĉina registaro por preventi kaj regi la disvolviĝon de la epidemio. Ni kredas, ke pro viaj fortostreĉoj kaj sinceraj, kompatemaj motivoj vi kapablos finfine plene ekstermi la viruson kaj sukcesos sanigi la infektitojn en ne tre longa tempo.

Al vi kaj al ĉiuj ĉinaj popoloj, precipe al la esperantistoj en Wuhan, ni kore deziras kuraĝon, sanon, feliĉon kaj sukceson en la batalo kontraŭ la nova koronaviruso en la musa jaro, kaj kore sopiras renkontiĝi kun vi en diversaj esperantaj okazoj de la tuta mondo. La viruso estas sen landlima. Preventado de la rego de epidemioj estas nia komuna batalo por la tuta homaro. Ni ankaŭ esperas, ke la tutmondaj Esperanto-amikoj sentime prenos paŝojn por plifortigi sian mem-protektadon. Ni fidis, ke per la komunaj klopodoj de la internacia komunumo, la epidemio estos venkita.

Ni ĉiam estas kun vi kaj sincere salutas vin

Nome de la Estraro kaj membraro de UEA

Duncan Charters, prezidanto de UEA

Malgaja statistiko

Je la 31a de marto en la mondo estis oficiale registritaj 872 mil 756 okazoj de la koronavirusa infekto. 184 mil 514 personoj resaniĝis, 43 mil 270 mortis, kaj 644 mil 972 estas kuracataj, inter ili 33 mil 446 estas en kriza stato.

Infektoj		Mortoj		Mortoj por 1 milono da loĝantoj	
Usono	188,592	Italio	12,428	San-Marino	766
Italio	105,712	Hispanio	9,053	Italio	206
Hispanio	102,136	Usono	4,056	Hispanio	194
Ĉinio	81,554	Francio	3,523	Andoro	155
Germanio	72,383	Ĉinio	3,312	Belgio	71
Francio	52,128	Irano	3,036	Nederlando	61
Irano	47,593	Britio	1,789	Francio	54
Britio	25,150	Nederlando	1,039	Svislando	50
Svislando	16,605	Belgio	828	Luksemburgio	37
Belgio	13,964	Germanio	788	Irano	36

AIKo

Legu ĉiujn elektronikajn librojn de Eldonejo Libera SENPAGE!

SED... bonvolu subteni la aŭtorojn per libervola donaco aŭ letero.
Koran dankon!

Donaco de la eldonejo *Libera*

Pro la tutmonda krizo, kaŭzita de la koronavirusa pandemio, la eldonejo *Libera* (Belgio) kune kun la aŭtoroj decidis **senpage** disponigi ĉiujn elektronikajn librojn de la eldonejo. Tiuj kiuj deziras, povos subteni la aŭtorojn per PayPal aŭ tra UEA (Ivld-x). Vi ankaŭ povos skribi leteron al la aŭtoroj.


Elŝutu ĉe: <http://www.eldonejolibera.be/>

Eldonejo *Libera*

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa printempa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Intervjuo



“Quatre-vingts” estas okdek en la franca lingvo. Ni kun plezuro sendas gratulojn al Carlo Minnaja okaze de lia kvarobla dudekjariĝo, festita la 19an de marto, kaj deziras al nia kara amiko, dokta helpanto, fidela abonanto kaj (ve, tro malofta) kunlaboranto multajn vivojarojn kaj novajn verkojn!

Carlo Minnaja: dampi la ekscesojn

La 19an de marto sian 80an naskiĝtagon festis prof. Carlo Minnaja, denaska esperantisto el Italio, akademiano, aŭtoro de la tre ampleksa itala-Esperanta vortaro (1996) kaj de *Historio de la Akademio de Esperanto* (2018), kunaŭtoro de *Historio de la Esperanta literaturo* (2015). Tradukinto de pluraj verkoj el la itala lingvo. Ligita al la literatura rondo *La Patrolo* kaj ĝia revuo *Literatura Foiro*. Okaze de la jubileo *La Ondo de Esperanto* intervjuis lin.

Elkoran gratulon pro via jubileo! Vi ĝus 80-jariĝis kaj ĉar vi estas denaskulo, vi jam duoble atingis la limon de 40-jara aktivado por membriĝi en Veterana Esperantista Klubo. Kiel vi fartas kiel duobla veterano?

Mi daŭre feliĉas, ke mi povis dum tiom da jaroj ĝui la kuneston, fizikan aŭ korespondan, de tiom da interesaj personoj, kutime malavare sindediĉaj al la sama idealo al kiu ankaŭ mi strebas: interkompreniĝo.

Vi estas ankaŭ unu el la plej malnovaj membroj de la Akademio de Esperanto, elektita en 1973 (nur John Wells estas akademiano pli longe ol vi – je tri jaroj). Sed tio ne estas la sola kialo por kiu vi estras la akademian komisionon pri ĝia historio. El via laboro rezultis la libro *Historio de la Akademio de Esperanto* (2018), ĉu vi povus rakonti, kiel vi kolektis la materialon por la verko kaj kion interesan vi elfosis?

La Akademio sub la prezidanteco de Gaston Waringhien estis komencinta eldoni serion de broŝuroj sub titolo *Aktoj*, el kiuj aperis nur tri kajeroj: 1963–1967, 1968–1974, 1975–1991. Ĉar la lasta ampleksis 15 jarojn, ĉirkaŭ 2004 maturiĝis la ideo eldoni plian numeron, sub titolo *Aktoj IV* kaj tiucele mi komencis kunmeti samstilan malneton; mi ja posedis ĉiujn cirkulerojn ekde 1973. La afero poste lamis, ĉar mi engaĝiĝis en aliaj laboroj, kaj intense reprenis tiun iniciaton nur en 2015, sentante min matura por verki plenan historion: mi ricevis ĉiujn cirkulerojn ekde 1952 pere de Birthe



Lapenna, multajn dokumentojn de la antaŭaj jardekoj mi ricevis de Reinhard Hauthenthal, Jean Amouroux, Geoffrey King kaj de volontulo ĉe la biblioteko Hodler. Sed surprize multaj estis la personoj al mi nekonataj kiuj, hazarde, posedis jen arkivon de forpasinta akademiano, jen kolektojn de gazetoj, jen listojn de biografioj kaj kiuj tre malavare disponigis ilin al mi.

Viaj gepatroj estis elstaraj esperantistoj, same via unua edzino parolis Esperanton, kaj la pli aĝa frato, la infanoj... ĉu eble ankaŭ la nepino? Vi daŭrigas belan tradicion. Sed imagu ke la gepatroj ne instruus al vi Esperanton, ke ili mem ne konus ĝin kaj vian hejmon en la infanaĝo ne vizitus eksterlandaj gastoj... Trafinte Esperanton poste en la vivo, ĉu vi lernus ĝin?

Malfacilas diri, kio okazus, se mia vivo, tiom forte trempita en la esperanta medio ekde la naskiĝo, estus male irinta tute alian vojon; sendube min allogus la ideo kontakti personojn kiuj ankaŭ celas kontaktojn, kaj se mi trafus de ekstere al esperanto-kunveno kie senpene interkompreniĝas diverslandanoj mi certe estus interesita pri ilia komuna lingvo.



Kvankam vi estas profesoro pri matematiko, inter viaj gravaj intereskampoj estas literaturo. Vi mem tradukas el la itala, sed ankaŭ abunde verkas, recenzas, kritikas. Kunlabore kun Giorgio Silfer vi kontribuis al la Esperanto-movado per *Historio de la Esperanta literaturo* (2015), pro sia amplekso rebaptita “la verda briko”. Kiel aspektis la laboro pri tiu libro?

Pri literaturo min pasiigis mia unua edzino, beletristino, tro frue forpasinta. La manko de iom organizita historio pri literaturo komparebla kun tekstoj je la nivelo de abiturienta ekzameno ŝajnis al mi grava truo en kultura socio kia la esperantista, kiu ja volus koni siajn literaturajn valorojn, sed ne havas gvidilon; ja estis rimarkindaj studoj pri tiu aŭ alia verkisto, sed mankis ĝenerala panoramo; ekzistis anglalingva enciklopedio, sed enciklopedio ne estas historio.

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa printempa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Eventoj



La partoprenantoj de la vintra sesio de la Interlingvistikaj Studoj, okazinta komence de februaro en Poznano, ne sciis, ke ĝi estas unu el la lastaj internaciaj Esperanto-eventoj en Eŭropo antaŭ la kvarantena epoko. (Foto el Edukado.net)

La 18a Novjara Renkontiĝo

Post unu jaro denove okazis en la junulara gastejo de Wiesbaden (Germanio) renkontiĝo por bonvenigi kaj festi Novan Jaron kun geamikoj. La eventon, kiu okazis de la 27a de decembro 2019 ĝis la 3a de januaro 2020, ĉeestis pli ol ducent geesperantistoj el diversaj partoj de la mondo. De pli malproksime venis partoprenantoj el Israelo, Kanado kaj Koreio. La striko de la francaj fervojoj kaŭzis malfacilaĵojn por tiuj, kiuj intencis alveni trajne el Francio. Samtempe kaj samloke okazis la 11a NIS (Novjara Internacia Semajno) por infanoj kaj gejunuloj, kiuj povis ĝui abundajn programerojn.

Post la bonvenigaj vortoj de la ĉeforganizanto Lu Wunsch-Rolshoven dum la interkona vespero ni povis gustumi frandaĵojn alportitajn de la partoprenantoj. La sekvan tagon okazis la urbo-gvidado tra Wiesbaden, kiu konigis al ni la plej vidindajn lokojn. Dum la semajno eblis viziti glacisketejon, muzeon, termobanejon, bahaan templon aŭ ĝui la Novjaran promenon.

La programo estis riĉega kun altnivelaj prelegoj kaj interesaj diskutrondoj. En diversaj prelegoj oni pritraktis klimaton, mediprotektadon, ekologion, kio fakte estis la kadra temo. Okazis diversaj Esperanto-kursoj kaj serio da lingvaj temoj. Prelegoj “Kiel prezenti Esperanton al pli ol cent infanoj”, “Kiel iĝi poligloto: teknikoj pri lingvaj

Wiesbaden: Manlaboroj, ekzemple, origamio, ĉiam estas en la programo de la Novjaraj Renkontiĝoj de EsperantoLand (Foto: Liba Gabalda)



interŝanĝoj”, “Sensuala plezuro de la prononco”, “Malĝustaj asertoj pri Esperanto”, “Rilatoj inter lingvoj kaj matematiko” allogis la esperantistojn.

Estis prezentata la Esperanto-kulturo tra kvindek jaroj de *Literatura Foiro*. Ni ankaŭ eksciis, kial la francaj poldevenuloj jubileas, kiel Eŭklido inventis matematikon kaj pri aliaj matematikaj misteroj. Oni parolis pri la vivkvalito, pri sana manĝado, pri kolesterolo, pri bicikloj kaj arto. Eblis sperti ĵongladon, sorobanon, rubikkubon, ĉigongon, malstreĉigan gimnastikon aŭ ĉeesti Sukuro-kurson de unua helpo.

Ĉiutage okazis diskutoj pri diversaj aktualaj temoj. “La nova silka vojo”, “Virinaj rajtoj”, “Rusia ekspansio”, “Financado en politiko”, “Klimataj ŝanĝoj – ĉu koŝmaro aŭ oportuno”, “Katalunio/Hispanio, Skotlando/Britio, du modeloj de sendependiĝo”. Krome interesis prelegoj “La Luno: 50 jaroj post la unua paŝo sur ĝi”, “La egipta vojaĝo al la transa mondo”, “20 jaroj de Reta Vortaro”, “Leonardo kaj Rafaelo, kiu superis kiun?”, “Kulturaj diferencoj inter Eŭropo kaj Azio”.

Luj interesiĝis pri dutaga seminario “Ĉu vi volas pravi aŭ feliĉi?” bazita sur la procezo SenPerforta Komunikado (SPK). Kolektiĝis ankaŭ amikoj de EsperantoLand. Estis prezentata la venonta UK en Montrealo kun diversaj planitaj ekskursoj. Bicikla vojaĝo portis nin de Tromsø al Porto.

Okazis tablo-tenisaj turniroj, verkado de poezio, kantado, muzikado, israelaj dancoj, zumba, biergustumado, vortludoj kaj kvizoj. Ne mankis manlaboroj, fabrikado de ornamaĵoj, trikado de polpetoj kaj aliaj aĵoj... En la halo estis instalita kesto por libroj alportitaj de partoprenantoj, kiujn oni povis libervole preni aŭ interŝanĝi.

Estis prezentataj diversaj filmoj, pupteatraĵo pri Aleksandro kaj la mekanika muso, japana teatro Kamiŝibajo, fotoj el pasinta NoRo, novjara koncerto de diversaj artistoj. Vesperan koncerton prezentis *Inicialoj DC*.

Libroservo proponis multajn librojn kaj aliajn esperantaĵojn. Je dispono estis diversaj tabluludoj kaj puzloj. El ruboj, kolektitaj ekstere, infanoj faris diversajn artaĵojn. Krome ili spertiĝis pri origamio, feltumis, faris bildojn el diversaj semoj, plektis braceletojn kaj ŝatis frandi ĉokoladajn bananojn.

Post la Silvestra bufedo ni bonvenigadis diversajn Novjarojn kaj dancis ĝis frumatenato. Estis prezentataj kantoj por la Festivalo de la Paco, organizata de Unesko, kiu okazos la 19an de septembro 2020 en Tolosa (Hispanio). La tekstoj devas esti tradukitaj al unu el la kvar laborlingvoj, inter kiuj estas ankaŭ Esperanto.

Dum la Internacia vespero ni spektis ĵongladon, ĝuis kantadon, dancadon, akrobataĵojn kaj aliajn kontribuaĵojn, prezentatajn de niaj ĉiuaĝaj talentuloj. Post la vesperaj programeroj interbabilado daŭris en gufujo. Ĉe la fino de la renkontiĝo sursceniĝis ĉiuj kontribuintoj de la diversaj programeroj, kiujn oni dankis per forta aplaŭdo. Dum la tuta semajno regis agrabla Esperanto-etoso.

La 18a NoRo estis sukcesa, ĉiuj entuziasme kunlaboris kaj promesis veni jarfine denove en la saman lokon por komune amuziĝi kaj ĝui la semajnon.

Liba Gabalda

Mia vojo al Esperanto kaj al la 5a Luminesk'

En mia klopodo teni min mense taŭga kiel nevidanta homo emeritiĝinta, mi ekkonis la planlingvon Esperanto. Mia unua kontakto kun Esperanto estis fine de 2014 en la regiona Esperanto-grupo en Leer en norda Germanio. La multaj eblecoj de la reto kaj la persona helpa kontakto kun esperantistoj baldaŭ alportis min al nivelo, de kiu mi povus daŭre lerni sendepende. Do fine de 2015 mi kuraĝis partopreni la unuan renkontiĝon Luminesk' en Nideggen. Mi sentis varme bonvenon de la organizantoj kaj de la partoprenantaj esperantistoj.

La varia kaj postulema programo instigis min partopreni la ĉiujarajn silvestrajn aranĝojn en Kleve, Haltern am See kaj en Königswinter. Per la "paroliga rondo" kaj pere de praktiko mi disvolviĝis al progresanto. En julio 2019 mi vojaĝis kun Andreas el Duisburg, mia helpema vidanta kunulo, tra Pollando kaj la Baltaj Ŝtatoj al Finnlando al la Universala Kongreso (UK) kaj la Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE) en Lahti. Dum nia vojaĝo per publika transporto ni ankaŭ vizitis regionajn Esperanto-grupojn, la Esperanto-radiostacion "Varsovia Vento", kaj pasigis nokton en la malnova sinagogo de Bjalistoko (rezidejo de la loka grupo).

De la 28a de decembro 2019 ĝis la 3a de januaro 2020 la 5a Luminesk' okazis en Nördlingen en suda Germanio kiel malgranda datreveno. Ĉirkaŭ 60 partoprenantoj el 12 landoj spertis la novan jaron en Esperantujo. Iuj partoprenantoj havis tre longajn vojaĝojn por fine atingi la Jufa-hotelon en Nördlingen.



Novjara kuirista konkurso (Foto: Anna Striganova)

La programo de la 5a Luminesk' denove estis tiel alloga kaj ekvilibra, ke ĝi ŝajnas pravigi ĉi tiun penadon por la partoprenantoj. Ĝi inkluzivis multajn altkvalitajn prelegojn pri politiko, komerco, informadiko, astrofiziko kaj socio. Estis kuirartaj trejnadoj kun kvizo, krimludo kun partopreno de aŭdienco, paroliga rondo, libroservo, kantado kaj danckurso, kaj ankaŭ ekskursoj kaj kulturaj ofertoj. La vintra universitato denove konfirmis la altkvalitajn normojn de Luminesk'. Vespere estis Gufujo (rondo de teotrinkantoj), amuza distra programo kun anekdotoj, fabelo-legado kaj multe pli. Aliaj sidis kune en malgrandaj grupoj kaj viglaj konversacioj pri kafo, biero aŭ vino.

Post la riĉa silvestra bufedo, oni montris la ripetitan polonezo-dancadon. Poste la silvestra balo kun muziko de la diskisto Rob kaj dancado okazis en festa salono ĝis ĉirkaŭ la 3a matene. La novjara promenado kondukis al la malnova urbo Nördlingen. La preskaŭ tute konservita urbomuro ĉirkaŭ la malnova urbocentro ekde la mezepoko, al kiu promenis multaj esperantistoj, estis impresa.

Taga vojaĝo venigis nin trajne al muzeo de la romea "Limes" kaj al la Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen. Pli ol 26 mil Esperanto-libroj estas konservataj tie. Inter ili estas ankaŭ Esperanto-libroj en Brajla skribo. La franca pianisto kaj kantisto Gijom alvenis por koncerta vespero sen sia dueto-partnero Melono.

La varma komunumo kun diverslandaj esperantistoj kaj la alloga trejnadprogramo de la 5a Luminesk' vivigis internacian komprenon; ĝi estas unu el miaj plej impresaj kaj daŭripovaj spertoj kun Esperanto. Mi ŝatus esprimi dankon al Andreas Diemel kun la organiza teamo kaj la multaj prelegantoj, ĉar ili denove ofertis bonegan programan semajnon. La 3an de januaro 2020 la adiaŭo de multaj partoprenantoj estis "Ĝis poste en Esperantujo", kiu povas esti ie ajn en la mondo, kie esperantistoj kuniĝas. Ĝis poste, en la bela, imagita lando de esperantistoj.

Werner Groen

Neĝkovrite en Pollando

La ĉi-jara JES (Junulara E-Semajno) okazis jarŝanĝe en Pollando, en bela regiono apud Ĉeĥio, en la Tabla Montaro. La nomo de la ripozejo estas "Szczeliniec" (en la vilaĝo Karłów), kaj mi ĝojis ke antaŭ la fino de la evento mi sukcesis prononci ĝin ĝuste! La loĝejoj estis la plej bonaj, kiujn mi iam ajn spertis en junulara Esperanto-aranĝo, belaj lignaj kabanoj kun bonega vido de la neĝo kaj montoj ekstere. Kiam mi estis malsana la unuajn du tagojn kaj devis resti la tutan tempon enlite, mi tre aprecis tion.

Pro tiu malsano kaj pro miaj devoj kiel TEJO-komitatano, mi bedaŭrinde ne povis ĉeesti tiom de la programo, sed la partojn en kiuj mi ĉeestis mi tre ŝatis. Unu matenon mi ekskursis al la montoj kun profesia loka gvidanto kaj tradukado al Esperanto. En Britio niaj vintroj signifas simple multe da pluvo, do la vido de la montoj neĝkovritaj estis tre plaĉa. En unu el la noktoj okazis silenta diskejo, kie oni havas kapaŭdilojn kun tri muzikkanaloj kaj povas elekti laŭ kiu muziko danci, kaj mi tre ĝuis



Jomo denove koncertas en JES (Foto: Ivo Miesen)

tion – mi esperas ke ankaŭ aliaj junularaj aranĝoj prenos tiun ideon. Mi volas mencii ankaŭ la koncerton de Tim Gallego. Ĝi estis elstara kaj mi antaŭĝojas aŭskulti liajn kantojn hejme, kiam ili finfine estos registritaj (iam en 2020, li promesis).

Dum la evento estis pluraj memorindaj aferoj, kiujn mi volas kundividi. Unu matenon mi kaj amiko decidis promeni, kaj ni simple elektis direkton kaj sekvis ĝin. Ni promenis unu horon ĝis ni atingis arbaron kaj poste ludis flugdiskon (Frisbee) – tre ĝuebla mateno en belega ĉirkaŭaĵo. Alian fojon mi malkovris la novan fenomenon: post multe da vento neĝo sekigigas kaj solidiĝas, do se oni metas piedon surneĝe, ĝi ne tuj sinkas sed unue rompiĝas glacia tavolo – mi estis kiel infano kiu vidis neĝon por la unua fojo.

Mi lernis multajn novajn kartludojn, enkondukis plurajn de miaj plej ŝatataj drinkoludoj al aliaj kaj ĝenerale feliĉe umis en la drinkejo kaj gufujo – kaj renkontis plurajn novajn amikojn kiujn mi esperas vidi denove. Kiam mi estis tre laca post la komitatkunsido (ĝi daŭris naŭ horojn kaj finiĝis nur horduonon antaŭ la komenco de la silvestra balo), mi kunportis mian kafon al la diskejo. Kaj mi ŝatis la sperton esti DJ la lastan nokton, malgraŭ la defioj de tiu rolo – seninterrete kaj devante klarigi al homoj, kial mi decidis ne ludi laŭ iliaj petoj. Sed ho ve!

Mi tre ĝuis la eventon, kaj post mia foriro Esperantujo vere mankas al mi. Do, dankegon al la organizantoj. Mi nepre klopodos reveni por la sekva jaro.

Tyron Surmon

Staĝo en Tajvano: Malgraŭ la korona viruso

Malgraŭ la proksimeco de la koronaviruso, de la 6a ĝis la 12a de februaro en la sud-tajvana urbo Pingtung (Pindon) kune staĝis sep koreaj kaj 13 tajvanaj esperantistoj kun partatempa ĉeesto de 22 neesperantistoj. La 6an de februaro ni akceptis la gastojn el Koreio, kaj la 7an okazis ekskurso en Kaohsiung (Gaushon, la dua plej granda urbo en Tajvano) sub la gvido de profesoro Cho, konata kiel Abengo.

La 8an de februaro ĉiuj kunvenis por la ĉefa laborprograma tago en la Fuxia lernejo, kiu apartenas al la Pingtung-a universitato. Koreoj bele ornamis la klasojn per ventumiloj, vestoj kaj aliaj ornamaĵoj, kaj tajvananoj preparis ornamaĵojn de la indiĝenoj de Tajvano kaj pendigis poŝtkartojn kolektitajn kadre de la internacia programo "Poŝtkruciĝo". Dum la tago okazis pluraj programeroj, ekzemple: kurso pri Esperanto-prononcado de Benjamin Irwin, kanadano kiu loĝas ĉi tie; kurso pri farado de braceletoj laŭ aborigena maniero, kiun gvidis Kuang-fu Hsu; sortodivenado per ChiGhin-aj kartoĵoj de Abengo; rakonto de la loka Esperanto-instruistino Ingrid Chuang pri "Poŝtkruciĝo"; kurso de Radiko pri farado de koreaj ventumiloj; senpaga masaĝo de la loka Esperanto-aktivulo Kevin Shih; kaligrafio de Wu Meilian. Dum la lasta programero en la lernejo Yvonne Chen instruis jogon sur apudlerneja herbejo.

Post la laborprogramo ni vizitis malnovan preĝejon, en kiu situas la sola Biblia biblioteko en Tajvano kun centoj da Biblioĵoj en multaj lingvoj. Gvidis la viziton pastro Marko Lin, usonano naskita en Tajvano, kiu flue parolas Esperanton. Vespere ni kunvenis en tradicia manĝejo por forigi la lacon de la tuttaga laborado. Fine kelkaj esperantistoj vizitis klinikon de Kevin Shih por ricevi piedan kaj korpan masaĝojn.

En la sekvaj tagoj estis vizititaj la urbo Tainan, la monto Ali, kaj la Suna Lago Tai-chung. La 12an de februaro la korea grupo post unusemajna restado reiris hejmen.

Reza Kheirkhah



Podia diskuto en Munkeno pri lingvoplureco en Eŭropo

La Informa Centro Munkeno de la Eŭropa Komisiono la 19an de februaro organizis podian diskuton pri la temo de la eŭropa lingvoplureco. Kundiskutis surpodie pensiĝinta profesorino pri la didaktiko de la latinidaj lernejoj lingvoj (do ĉefe la franca, iom itala kaj hispana supozeble), Krista Segermann, kaj mi, Lu Wunsch-Rolshoven, kiel gazetara reprezentanto de Germana Esperanto-Asocio. La diskuton gvidis Birgit Schmitz-Lenders, estrino de la Eŭropa Akademio en Bavario. Ĉeestis kvindekda gastoj, inter ili ankaŭ kelkaj Esperanto-parolantoj el Munkeno kaj ĉirkaŭaĵo, eĉ unu homo alvojaĝinta el Berlino.

En la enkonduko prof. Segermann pozitive taksis la lingvoplurecon. Laŭ ŝi gravas superi ĝin per lerta agado. Por tio ekzistas pluraj modeloj, kiujn ŝi prezentis. Ekzemple ambaŭ interparolantoj povas paroli la propran lingvon; tiam oni devas lerni la lingvon de la alia nur pasive. Krome eblas uzi internacian lingvon kiel la anglan aŭ la francan kaj krome t.n. artefaritan lingvon kiel Esperanto – ĉe tio laŭ ŝi estas dube, ĉu la kultura funkcio estas bone konsiderata. Por ŝi aparte gravas la bona didaktiko de la fremdlingvoj.



Foto: Alfred Schubert

Ĉe la komenca prezento de mia opinio mi iom prezentis Esperanton kaj ĝian lingvokomunumon. Mi krome menciis la kreskantan disvastiĝon kaj rekonon de la lingvo (PEN Internacia, Vatikano; Pollando, Hungario, Kroatio, Ĉinio). Krome mi atentigis pri esencaj avantaĝoj kompare kun la angla kaj aliaj lingvoj: Esperanto estas multe pli rapide lernebla ol aliaj lingvoj, proksimume en kvarono de la kutima tempo. En Esperanto la kulturoj de la mondo estas pli egalrajte reprezentitaj – la angla prezentas ĉefe la kulturon de la denaskuloj de la angla. Esperanto signifas paŝon direkte al la alia – ĉe la angla oni avantaĝigas la parolantojn de la angla. Ĉe Esperanto la lernotempo por la parolantoj de la diversaj lingvogrupoj – latinidaj lingvoj, ĝermanaj, slavaj, finna kaj hungara, ĉina k. a. – estas multe pli simila. Kontraste por la angla la lernotempo por hungaroj kaj ĉinoj estas multe pli granda ol por nederlandanoj aŭ svedoj; tio signifas grandan malegalecon.

Estis rimarkinde ke en la diskuto prof. Segermann konstatis, ke Esperanto kiel internacia lingvo povas bone konkurenci kun la aliaj lingvoj. Aliflanke mi estis iom surprizita, kiam ŝi esprimis la opinion, ke la instruado de la franca povus okazi en simila tempo kiel tiu de Esperanto – se oni nur lerte instruas. Tio ne estas kredinda, ĉar Esperanto kutime estas lernebla en 25% de la tempo necesa por la franca, kiel montris pluraj lernejoj eksperimentoj. Sekve estas tre malfacile imagi, ke eblas redukti la tempon por la franca de 100% al nuraj 25%, se oni nur havus la bonan instrumentodon...

Pluraj aŭskultantoj faris interesajn komentojn, rakontis pri siaj spertoj kun lingvo-lernado kaj metis demandojn. Virino el la publiko iam lernis Esperanton, sed poste bedaŭrinde ne trovis la vojon al la Esperanto-komunumo. Aliaj menciis, ke ili relative rapide lernis la anglan; malfacile tion kompari kun Esperanto, se oni ne lernis krome tiun lingvon.

Unu aŭskultantino atentigis ke Esperanto estas ŝia denaska lingvo kaj same la denaska lingvo de ŝiaj filinoj; tio ŝajne pozitive impresis al prof. Segermann.

Post la diskuto tri el la gastoj estis tre interesitaj kaj pozitive parolis pri Esperanto al mi. Unu demandis pri Esperanto-kurso en Munkeno kaj sinjorino proksimume sepdekjara same interesiĝis kaj demandis, ĉu eblas plu lerni Esperanton en ŝia aĝo; jes, eblas :) Tria homo, evidente eksterlandano kiu ne jam tre bone parolis la germanan, tre laŭdis ĉe Esperanto la ideon, ke ambaŭ flankoj alproksimiĝas al la alia per unu paŝo; ne devas lerni unu el la du la lingvon de la alia – oni renkontiĝas en la mezo.

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa printempa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Germanio: ruslingve pri Esperanto per televido

Deutsche Welle. La Moskva studio de la germania poreksterlanda radia-televida kompanio Deutsche Welle okaze de la 160a naskiĝdatreveno de Zamenhof meze de decembro sendis la junan ĵurnalistinon Anna Savĉuk al la Esperanto-urbo Herzberg am Harz (Malsupra Saksio, Germanio).

La ĵurnalistino filmis en Herzberg am Harz la Welf-kastelon kun Esperanto-ekspozicio, la Jues-lagon kun plurlingvaj arboŝildoj, la Zamenhof-placon kun la Zamenhof-monumento, multajn dulingvajn ŝildojn dise en la urbo, la Esperanto-Centron kun granda librokolekto, la Esperanto-ĝardenon ktp. Savĉuk ankaŭ intervjuis la urbestron de la Esperanto-urbo Lutz Peters kaj kelkajn lokajn kaj aliurbajn esperantistojn, kiuj kunvenis en la Esperanto-urbo je la Zamenhof-Taga renkontiĝo.

La kvarminuta ruslingva programo kun la titolo “Город в Германии, где официально говорят на эсперанто” (Urbo en Germanio, en kiu oni oficiale parolas Esperanton) estis premiere montrita la 6an de januaro 2020.

Spektebla en jutubo <https://youtu.be/nsxrY1OirUg>

OstWest. La 16an de februaro la privata televida kanalo OstWest, tutdiurne emisianta ruslingve en Berlino, montris la programon “Как звучит эсперанто и зачем в Германии учат искусственный язык?” (Kiel sonas Esperanto kaj por kio en Germanio oni lernas artefaritan lingvon). Dum preskaŭ unu horo la programgvidantino Jelena Minenkova konversaciis kun la konataj esperantistoj Aleksandr Galkin kaj Steve Cobb. En la programo aperas ankaŭ aliaj esperantistoj kaj esperantaĵoj.

Spektebla en jutubo: <https://youtu.be/vbc8e24XdjI>

Nova posteno de Vytenis Andriukaitis

Eksa Membro de la Eŭropa Komisiono, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA Vytenis Andriukaitis ekde la 1a de marto 2020 laboras kiel speciala ambasadoro de la Monda Organizaĵo pri Sano por la Eŭropa regiono. Li okupiĝas pri ĉiuj sanrilataj aferoj. Lia oficejo estos en Kopenhago. Sub lia labortereno estas 53 Eŭropaj ŝtatoj. Antaŭvideblas, ke li tre multe oficvojaĝos – pli-malpli ĉiusemajne li estos en iu lando.

Samtempe Vytenis Andriukaitis laboras kiel eksperto-konsilisto pri sano ĉe UN. Krome, li prelegos en la Ĝeneva Universitato.



Povilas Jegorovas

Parlamentara medalo por Povilas Jegorovas

La 4an de februaro 2020 speciala komisiono de la Litovia parlamento (Sejmo) per sekreta voĉdonado decidis atribui la parlamentaran medalon de Gabrielė Petkeviĉaitė-Bitė “Tarnaukite Lietuvai” (Servu al Litovio) al la prezidanto de Litovia Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas pro lia esperantista agado.

La medalo, establita en 2011, havas la nomon de la elstara litoviano Gabrielė Petkeviĉaitė-Bitė (1861-1943), kiu estis membro de la unua Sejmo kaj, kiel la plej aĝa membro, prezidis la unuan kunsidon de la parlamento la 15an de majo 1920.

Ĉi tiu plej alta distingo de la Litovia parlamento ekde 2011 estas ĉiujare atribuita al maksimume 16 eminentaj personoj – po maksimume al kvar personoj en kvar diversaj kategorioj pro volontula socia agado. Povilas Jegorovas ricevis medalon en la kategorio “Pro disvastigo de kulturo de volontula agado”. Per ĉi tiu medalo oni mencias meritojn al la Litovia ŝtato kaj ties bono, iniciaton kaj realigon de pozitivaj ideoj por civitana socio, nacia kaj kultura konscio.

Ŝiajn rekomendojn al la parlamentara komisiono por dekori Povilas Jegorovas per ĉi tiu medalo prezentis eksa Membro de Eŭropa komisiono Vytenis Andriukaitis, eksa prezidanto de Sejmo Ĉeslovas Jurŝėnas, parlamentano Tomas Tomilinas, ambasadoro Rimantas Ŝidlauskas, verkisto Laimonas Inis, Monda centro de litovoj kaj Litovia libroamanta societo.




Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa printempa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:


<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Tribuno



La Moskva metropoliteno, lanĉita en majo 1935, estas la plej granda en Eŭropo, laŭ la intenso de la uzado. En ĝia pli ol 400-kilometra reto estas 233 stacioj, inter kiuj 48 havas la statuson “kultura heredaĵo”. Dum la 85-jara historio la Moskva metroo ekhavis legendojn kaj mitojn; pri kelkaj el ili rakontas nia redakciano Valentin Melnikov.

Nia pakto kun la tagiĝo



Eseo de Probal Dasgupta

Antaŭ dudeko da jaroj, mi vizitis Srilankon pro nekutima laboro – pacama, principe esperantisteca, tamen ne kun uzantoj de Esperanto. Mi iris tien kiel membro de plurnacia brigado da instruantoj pri la tradukarto. Ni volontulis per pacaj rimedoj iomete kuraci tiun insulan landon sangantan pro enlanda milito. Invitite de universitata fakultatestro en la urbo Kandy, ni tie labortendare instruis liajn kolegojn kaj studentojn, kaj aliajn interesatojn el diversaj srilankaj universitatoj, pri la tradukistiko kaj parencaj lingvosciencaj konceptoj. Niaj trejnitaj intencis traduke pontofari inter la sinhala, la tamila kaj la angla, kaj tiel krei bazon por fortika paco.

Mi rememoras hodiaŭ tiun gravan komencon. En kaj apud la Esperanto-movado, ni faras kulturen laboron por la paco, ni ree kaj ree faras tiajn komencojn, ankaŭ se ni ne atendas ke precize tiuj komencoj atingos sukcesan kulminon. Ni semas kaj semas, neniam laciĝas – precipe en la landoj sudaj, ĉe homoj junaj, tagiĝaj, komencemaj, senlacaj. La esperantistaro estas plenplena je komencantoj pri la paca lingvo. Ne hontinde. Eĉ la plej avangardaj homoj estas komencantoj pri la homarana konscio. Ni fieru ke niaj veturiloj startas kaj restartas kaj restartas sur tiu vojo.

Esperanto estas homarana movado, kiu centfoje stumblas kaj tamen redebutas sur la arenoj de la mondo. Niaj debutoj diversas laŭ la regionoj. Brazilo, ekzemple, foje investegis energion en la lerneja agado. Se la ĉefaj agantoj pacience fosados sian sulkon, pli aŭ malpli frue multaj lernejoj en Brazilo instruados nian lingvon al milmiloj da geknaboj. Tio estos unu speco de ekflorado. Dependos de la politika vetero, kiom frue aŭ malfrue tiuj semoj fruktos. En dua lando gravas la universitataj studentoj. En tria lando reliefe aktivis la maljunuloj, homoj de la “tria aĝo”. Ilia matura saĝo fortigas nian ĝardenon per radikoj profundaj. Se iam brazilaj lernejoj amase lernos Esperanton, ili eventuale trovos amemajn kaj diligentajn korespondgeaĵojn en Pollando.

Kiom da lokoj, tiom da vokoj. Kiom da aĝoj, tiom da saĝoj. Efektive, egale gravas la homoj el ĉiuj generacioj, ne nur la lernejanoj. Kial do emfazi la komencemon de movado re kaj re debutanta? Kial elekti por eseo la titolon “nia pakto kun la tagiĝo”? Estimataj, kompreneble ni bezonas agemulojn el ĉiu aĝo. Mia celo ja ne estas atentegi nur la infanaron, sed tra la tuta gamo de niaj fortostreĉoj insiste emfazi la reunigadon de la homarana impeto. La tago reunigas sin je la tagiĝo – je tiu momento, kiam la tago mem estas komencanto kaj rememoras havi magian pakton kun ni esperantistoj. Kian enhavon mi imagas por tiu magia pakto? Jen la ĉefa demando por ni hodiaŭ.

La respondo al tiu demando plej valida por vi havas kiel ekirpunkton la fruajn paŝojn de via persona vivo. En via infanaĝo, vi ekkonis la plej senperajn personojn kaj faktojn. *Koni* tiun vian medion estis la ĉefa celo de viaj eklernoj. Ni nomu tiun fruan medion “*via medieto*”. Poste, plu kreski signifis por vi lerni en lernejo, studi en universitato, legi gazetojn, viziti sociajn retejojn. Vi abunde trinkis de tiuj fontoj de *sciado*. Tial, multon ne rekte *konatan* vi tamen *scias* – multajn faktojn pri sportistoj, politikistoj, kantistoj, aktoroj, montoj, riveroj, gejseroj, dezertoj. Vi neniam renkontos ilin, sed iliajn detalojn vi rapide liveras dum kvizoj. Tiuj objektoj de via serioza scio aperas do en “*via mediego*”, tiel ni nomu ĝin.

Nun mi starigas al vi nekutiman, tute eksterkvizan demandon. Kie en la horaro de via tagnokto aperas la medieto konata ekde via infaneco kaj la mediego sciata ekde via lernejado? Pensu iomete. Dum la funkciaj horoj de la *tago* – ĉu labora, ĉu feria tago, tio ne gravas – la *sciatoj* el *via mediego* nepre iel-tiel aperadas sur via ekrano. Sed en la *nokto*, dum vi dormas, viaj sonĝoj foje venigas sur vian ekranon la *medietajn*, intimajn homojn kaj lokojn, la *konatejojn*. Jen iuj elementoj el la ordinara ritmo de viaj tagoj kaj noktoj.

Sed vidu, la tagiĝo estas magia momento. Ĝi prezentas eblon de io eksterordinare alia, eblon de utopio. Tiu momento diras al vi ke alia mondo eblas. La potenco de tiu sankta momento donas al vi la subitan kuraĝon revii ke la tago nun naskiĝanta ne ripetos la ŝablonon de viaj rutinoj. Ĝi malfermos al vi aventuran pardonon; trans ties sojlo vi renkontos tute novan elementon – *sci-konon*. Tiu mirinda sci-kono metos la *konatejan*, *medietan* realon de viaj noktoj en ĉioŝanĝan, eksterordinaran interkirladon kun via tago. For la tagordon, vi krios, for la banalan tagordon stulte truditan de tiu *mediego* kiun mi rigardis kiel *sciatan*!

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa printempa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Fino, aŭ kio?


de **Ed Robertson**

Kvazaŭnekrologo: La Unuiĝinta Reĝlando en Eŭropa Unio, la 1a de januaro 1973 – la 31a de januaro 2020

Dum mia junaĝo, la *Unuiĝinta Reĝlando de Britio kaj Nordirlando* (UR) fariĝis parto de la Eŭropa Unio, nome je la novjariĝo de 1973. Notu, ke mi ne uzas ĉi-kuntekste la terminon *Britio*, ĉar la UR inkluzivas ankaŭ la plej nordorientajn ses graflandojn de Irlando. Ankoraŭ ne temis pri la *Eŭropa Unio*, sed tiam nur pri la *Eŭropa Ekonomia Komunumo* (EEK). Mi memoras, ke kelkaj homoj tiam, samtempe festantaj pri la jarŝanĝiĝo, demandis unu de la alia: “Ĉu vi sentas vin eŭropano nun?”

Bona demando. Por multaj el ni en Skotlando tiam, kaj eĉ pli tamen nun, alia demando, kiu fariĝis grava, estis: ĉu ni sentu nin pli skotaj, aŭ pli britaj? Por mi mem, estante laŭ la gepatra deveno duonskota kaj duongermana, eŭropeco estis jam parto de la ekvacio. Du jarojn pli poste, en 1975, ni rajtis finfine voĉdoni pri la decido farita de la britaj parlamentanoj jam en 1971. Referendumo en la Unuiĝinta Reĝlando estis tre malkutima okazaĵo, ĉar la tiama sinteno ĉe ni estis, ke politikajn decidojn inter balotoj faras parlamentanoj.

La referendumo de 1975 pri Eŭropo estis tute malsimila al tiu, kiu okazis en la Unuiĝinta Reĝlando pli lastatempe, en 2016. Certe en 1975 estis kelkaj, tiuj, kiuj nostalgiumis pri la grandioza Brita Imperio, jam finfine agonianta, kaj tiaj homoj do kontraŭis la ideon pri unuiĝo kun eŭropanoj, kaj eĉ pretendis, ke “ni” savis ilin (la eŭropanojn) en du mondmilitoj. Sed ankaŭ granda parto de la tiutempa rezisto kontraŭ la brita membriĝo en EEK venis tiam de la maldekstrularo, el kiu multaj kritikis la



EEK-on kiel “kapitalistan klubon”, kiu, ili asertis, malpermesus la ŝtatigon de gravaj partoj de industrioj kaj servoj. La ideo pri faciligo de kontaktoj inter popoloj, inter laboristoj eĉ, ŝajne ne ludis gravan rolon en la pensado de multaj, kiuj nomis sin socialistoj. Mi devas konfesi, ke tiam eĉ mi troviĝis en tiu tendaro.

La rezulto de la referendumo de 1975, tamen, estis kristalklara. La demando estis: “Ĉu vi opinias, ke la Unuiĝinta Reĝlando restu en la Eŭropa Komunumo (la Komuna Merkato)?” La opinio de la popolo, aŭ de la 64%, kiuj efektive voĉdonis en 1975, tamen, estis ke pli ol 67% el ili volis resti en la Eŭropa Komunumo, kaj nur preskaŭ 33% voĉdonis por eliro. Kaj tio servis kiel respondo al la demando por jardekoj.

La vortumado de la demando en la referendumo de 2016 pri EU estis malpli pozitiva: “Ĉu la Unuiĝinta Reĝlando restu membro de la Eŭropa Unio, aŭ forlasu la Eŭropan Union?”. Kaj la rezulto, per finfine tre malgranda majoritato, estis malpli definitiva, kaj politike la malo de tiu en 1975: preskaŭ 52% por eliro, iomete pli ol 48% por restado. La procentaĵo de la rajtigitoj kiuj voĉdonis en 2016 estis 72%, do almenaŭ la nivelo de intereso pri la EU kreskis dum tiuj intervenintaj 41 jaroj.

Kio ja okazis intertempe? Interesa malsameco inter la du rezultoj estas ne nur, ke la procentaĵoj ŝanĝiĝis, sed ankaŭ, ke la lokoj de tiuj, kiuj subtenis rilaton kun Eŭropo ŝanĝiĝis. En 1975, la kontraŭantoj troviĝis en Skotlando. En la okcidentaj insuloj de Skotlando eĉ 70% de la voĉdonintoj kontraŭis, kaj la cetero de Skotlando certe ne entuziasmis tiom, kiom Anglio. En 2016, kontraste, la subtenantoj de la EU troviĝis en Skotlando, kaj la nordo de Irlando. En Skotlando kontraŭis Briteliron el EU 62% kaj subtenis tion nur 38%, kaj en la nordo de Irlando 56% kontraŭis Briteliron kaj 44% estis por. Do, du landoj el la kvar “partneroj” en la Unuiĝinta Reĝlando ne subtenis la komunan rezulton.

Ĝena afero por multaj skotoj estis la fakto, ke en la skotlanda sendependec-referendumo de 2014, la brita registaro asertis, ke la sola maniero por skotaj voĉdonantoj certigi pri daŭra membreco de Skotlando en la EU, estus por Skotlando resti en la Unuiĝinta Reĝlando. Povas esti, ke tiu aserto estis decida registara karto sur la ludotablo, kaj sen ĝi, eble la skota sendependec-referendumo havintus alian rezulton. Tamen, en la historio, kiu fakte okazis, Skotlando devis akcepti la rezulton de la referendumo de 2016. Sed ironie, do, la nuna situacio eble igas pli verŝajna rapidan estontan skotan realiĝon al la EU post sendependiĝo ol estintus la kazo post sukcesa referendumo pri sendependeco en 2014.

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa printempa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Legendoj kaj realo de la Moskva metroo

de Valentin Melnikov

Kiel ĉiu populara kaj longe ekzistanta (ekde 1935) sistemo, la Moskva metropoliteno havas multajn interesaĵojn, kaj iom post iom ĉirkaŭ ĝi formiĝis diversaj legendoj, ankaŭ superstiĉoj.

Oni asertas, ke la ringa linio – kiu dekomence ne estis en la perspektivaj planoj de 1930aj jaroj – konstruita en 1949-54 kaj sur ĉiuj skemoj montrata kiel bruna rondo, aperis kvazaŭ pro tio, ke Stalin, dum iu diskuto kun la urbestro pri la perspektivoj de la metroo, metis sur la mapon tason kun kafo. De la taso restis rinda bruna spuro, kaj poste timemaj-servemaj-humiliĝemaj projektantoj rapide planis la ringan linion.



Reale, tio ne povis okazi. Stalin ne okupiĝis pri urbaj aferoj – nur pri la ŝtataj; kaj se tia diskuto okazus, oni uzus detalan mapon, kun 1-2-metra dimensio. Lasi samskalan spuron sur ĝi povus nur sitelego... kaj perfekte runde tiu linio aspektas nur sur simplaj skemoj, en la realo kaj sur detalaj mapoj ĝia formo estas komplika.

Cirkulas onidiroj, ke en la metroo estas ia mutaciiga radiado, kaj pro ĝi aperis grandegaj trimetraj ratoj, vagantaj en tuneloj, kaj aliaj monstroj, kiuj eĉ lumas per si mem.

Reale, en 1990aj jaroj, precipe inter novriĉuloj, estis modo havi hundojn “pitbull” – ekstere similajn al proporcie pligrandigita rato. Unu tia hundo foje forkuris, dum kelka tempo vagadis en tuneloj. En tre malforta lumo, de malproksime ĝi vere similis gigantan raton. Kiel kutime, por evoluo de klaĉoj, duonmetra rato transformiĝis en dumetran, poste en trimetran. La hundo estis sola, ĝi delonge mortis, sed la idiotaj onidiroj cirkulas ĝis nun. Cetere, nenia radiado estas en la metroo – kaj eĉ se ĝi ekzistus, bestoj pro ĝi simple mortus, sed ne lumus. Trankviliĝu...

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa printempa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Jubileoj kaj memordatoj en aprilo 2020

3. Antaŭ 115 jaroj naskiĝis **Georgij Nikolajevič Teterin** (Тетерин, 1905-1921-1972), sovetunia inĝeniero kaj superlerneja instruisto de radiokomunikado kaj aktiva esperantisto; unu el la refondintoj de la Esperanto-movado en Peterburgo meze de la 1950aj jaroj, prezidanto de la Leningrada Esperanto-Klubo, kunaŭtoro (kun Z. Semjonova) de lernolibro de Esperanto (1958).

8. Antaŭ 10 jaroj mortis **Higinio García Gómez-Quintero** (1939-1955-2010), hispan-devena kanada instruisto de lingvoj, filozofio kaj teologio, kaj esperantisto; redaktoro de *Aujourd'hui l'espéranto*, aŭtoro de la fantasta novelaro *Kapturnoj* (1999).

11. Antaŭ 35 jaroj mortis **Vilho Setälä** (1892-1906-1985), pioniro de la finnlanda fo-
toarto, kreinto de la finnlingva fotoleksiko, kaj la plej konata finna esperantisto; sekretario (1918-22) kaj prezidanto (1955-65) de Esperanto-Asocio de Finnlando, ĝenerala sekretario de la 14a UK (Helsinki, 1922), fondinto kaj redaktoro de *Esperanta Finnlando* (1918-73, kun paŭzoj); komitatano de UEA (1920-63), membro de la Akademio de Esperanto (1930-85); aŭtoro de pluraj vortaroj, lernolibroj kaj libroj en/pri Esperanto inkluzive de la finna-Esperanta vortaro (1923) kun pli ol 30 mil kapvortoj kaj lernolibro *Privilegia vojo al lingvoscio: Esperanto kun kvar internaciaj, tri finnaj kaj du svedaj eldonoj*; honora membro de UEA (1933), honora prezidanto de EAF (1979). — Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (NDK), p. 255-257.

12. Antaŭ 85 jaroj naskiĝis **Erich-Dieter Krause** (1935-1947-), germana lingvisto, leksikografo kaj esperantisto; aŭtoro de Esperantaj vortaroj, laste de la 1679-paĝa *Großes Wörterbuch Deutsch-Esperanto* (2007) kaj 1512-paĝa *Vollständiges Wörterbuch Esperanto-Deutsch in zwei Bänden* (2018); membro de la Akademio de Esperanto (1986-).

12. Antaŭ 125 jaroj naskiĝis **Andreas Gregorius Joannes Cseh** (pron: Ĉe, 1895-1911-1979), rumania, poste nederlanda romkatolika pastro kaj religia instruisto, kaj esperantisto konata en Esperanto kiel Andreo Cseh; la plej konata Esperanto-instruisto inventinta sian originalan rektan metodon por instrui Esperanton; sekretario de Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado (1924-29), komitatano de UEA (1928-34), kunfondinto de Universala Ligo (1942), fondinto kaj redaktoro de *La Praktiko* (1932-63, kun milita paŭzo); membro de la Akademio de Esperanto (1932-70), direktoro de la Sekcio por la Gramatiko (1937-40), vicprezidanto de la Akademio (1951-63). Honora Membro de UEA (1933). — Legu pli en NDK, p. 62-63.

14. Antaŭ 130 jaroj naskiĝis **Stanisław Karolczyk** (1890-1907-1965), pola oficisto kaj esperantisto, konata en Esperanto kiel Eska, refondinto, eldonanto kaj redaktoro de *Pola Esperantisto* (1922-26), kelkatempa prezidanto de Pola Esperantista Societo; tradukinto de pluraj polaj beletraĵoj kaj unu el la du aŭtoroj (kun S. Braun) de la poemaro *Unuaj agordoj* (1912); membro de la Akademio de Esperanto (1948-53).

19. Antaŭ 155 jaroj naskiĝis **Aleksandr Andrejevič Saĥarov** (Сахаров, 1865-1904-1942/43), impostoficisto, instruisto kaj esperantisto; la unua profesia esperantisto en

Ruslando, fondinto de la librejo (vendejo kaj eldonejo) *Esperanto* (1907) kaj de la gazeto *La Ondo de Esperanto*, kiun li eldonis kaj kunredaktis (1909-17); kompilinto de ses didaktikaj libr(et)oj (lernolibro, du vortaroj, ŝlosilo, frazlibro kaj krestomatiaĵo), kiuj en 1916 aperis kiel 448-paĝa volumo *Весь язык Эсперанто* (La tuta lingvo Esperanto), aŭtoro de la satira novelo *Superforta ambicio* (1913) kaj de *Rememoroj de centprocenta esperantisto* (posteume, 1993). — Legu pli en NDK, p. 246-247.

23. Antaŭ 140 jaroj naskiĝis **Aleksandr Aleksejeviĉ Postnikov** (Постников, 1880–1907-1925), rusa oficiro kaj esperantisto; propagandisto de Esperanto, kunfondinto (1908) kaj prezidanto (1909-11) de Ruslanda Esperantista Ligo fermita post lia aresto, refondinto kaj eldonanto de *Ruslanda Esperantisto* (1909-10), ĉeforganizinto de la unua Ruslanda Esperanto-Kongreso (Peterburgo, 1910), fondinto de Universala Ligo (1910). — Legu pli en NDK, p. 233-234.

25. Antaŭ 15 jaroj mortis **Itō Kanzi** (1918-1959-2005), japana eldonisto kaj esperantisto, aŭtoro de okvoluma japanlingva romano pri Zamenhof (1967-83); kolektinta kaj editorinta kun la pseŭdonimo Ludovikito verkojn kaj tradukojn de Zamenhof, aliajn tiutempajn dokumentojn, presaĵojn kaj leterojn kadre de la 58-voluma serio; honora membro de UEA (1990), laŭreato de la Esperanto-Kulturpremio de la urbo Aalen kaj FAME-Fondaĵo (1991). — Legu pli en NDK, p. 139-140.

25. Antaŭ 70 jaroj naskiĝis **Peter Zilvar** (1950-1972-), germana administranto, asekuristo kaj esperantisto; gvidanto de GEA-Filio por Klerigado kaj Kulturo = Esperanto-Centro Herzberg / Interkultura Centro Herzberg (ICH) ekde ĝia fondo en 2004; ekde la proklamo de Herzberg am Harz kiel “la Esperanto-urbo” kunordiganto de la varia por kaj per-Esperanta agado en la urbo; aŭtoro de centoj da priesperantaj artikoloj kaj de du libroj en Esperanto; honora membro de GEA (2008), la Esperantisto de la Jaro 2007. — Legu pli en NDK, p. 307-308.

27. Antaŭ 35 jaroj mortis **Lajos Kökény** (1897-1919-1985), hungara instruisto, stenografo kaj esperantisto, prezidanto de Hungarlanda Esperanto-Societo (1941-47); redaktoro de *Hungara Heroldo* (1928-30, 1935-36), *Hungara Vivo* (1961-68) kaj *Hungara Esperantisto* (1971-73), redaktoro de la duvoluma *Enciklopedio de Esperanto* (1934-35); aŭtoro de kelkaj libroj en/pri Esperanto; honora prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio (1978), honora membro de UEA (1980). — Legu pli en NDK, p. 157-159.

28. Antaŭ 80 jaroj naskiĝis **Jacques Le Puil** (1940-1958-), franca diversprofesiulo, kantisto kaj esperantisto, konata en Esperanto kiel Ĵak Le Puil kaj Ĵak Lepuïl; ofta koncertanto en Esperantaj kongresoj kaj renkontiĝoj, kantisto kaj muzikisto en ses muzikaj albumoj (*Danĝera ul'*, 1977; *Revenas mi*, 1984; *De Pont-Aven al Varsovi'*, 1985; *Ne donu tro*, 1994; *Mi estas*, 2004; *Sen elizi'*, 2014); kunfondinto (1976) kaj ĝisnuna redaktoro de *La KancerKliniko*; ĉefredaktoro de *Grand dictionnaire français-espéranto* (kun J.-P. Danvy k. a., 1992), tradukinto de pluraj libroj; laŭreato de la premio de OSIEK (2007). — Legu pli en NDK, p. 175-177.

Antaŭ 125 jaroj: Lev Tolstoj kaj la unua Esperanta gazeto

de Aleksander Korĵenkov

En la novembra numero de la unua esperantista revuo *Esperantisto* (1894), lanĉita de Lazarj Markoviĉ “Ludoviko” Zamenhof (1859-1917) en septembro 1889 kiel *La Esperantisto*, aperis la rezulto de la voĉdonado pri la reformado de Esperanto. Kvankam ĉi tiu decido stabiligis la lingvon, pluraj esperantistoj, precipe eksvolapukistoj, forlasis Esperanton. Ekzemple, Christian Schmidt kaj la tuta Mondlingva Klubo de Nurenbergo adiaŭis Esperanton kaj aliĝis al Idiomo-Neutral; ĝis 1903 en Germanio ne ekzistis esperantistaj societoj. Antoni Grabowski, “la patro de la Esperanta poezio”, forlasis Esperanton por preskaŭ dek jaroj.

Wilhelm Heinrich Trompeter (1839-1901), kiu dum kelkaj jaroj administris *Esperantiston* kaj pagis salajron al ĝia redaktoro Zamenhof, donis sian voĉon por la reformoj kaj anticipe anoncis, ke li financos la gazeton nur ĝis la fino de la 1894a jaro. Zamenhof en januaro 1895 devis repreni la administradon de la gazeto. Ĝia abonantaro draste falis de 889 en 1893 al nur 596 en 1894, kaj tiu nombro verŝajne plu malkreskus en 1895 pro la malabonoj de la ekzistintoj (la lasta abonlisto registris nur 425 ricevitaĵajn abonojn).


Zamenhof serĉis novajn eblojn por popularigi sian gazeton. Li kontaktiĝis kun la tolstojanisma redakcio de eldonoj de *Posrednik* (Peranto), kiu jene klarigis siajn motivojn por kunlaboro:



Stariĝante sur la fundamenton de unu por ĉiuj facile aliĝebla lingvo internacia Esperanto, ni esperas disvastigi nian agadon, komencinte komunikiĝadon kun egale kun ni pensantaj homoj de diversaj landoj kaj popoloj kaj altirinte ilin al kunsento kaj partoprenado en la elektita de ni servado – al la kreo de regno de Dio.

Ĉar kiel organo de la lingvo internacia Esperanto en la nuna tempo servas la gazeto “Esperantisto”, tial ni volas ekuzi ĝin por la atingado de la celoj de nia servado».

(*Esperantisto*, 1895, №2, p. 28.)



Sekve de ĉi tiu “partneriĝo” *Esperantisto* perdis sian neŭtralecon en la sferoj de etiko kaj religio. Unuafoje la rubriko *Folieto de “Posrednik”* aperis en la februara *Esperantisto*; en ĝi estis presita la verketo *Prudento aŭ Kredo?* de Lev Nikolajevič Tolstoj (1828-1910) kun antaŭparoloj de Zamenhof kaj *Posrednik*.

Temas pri letero de Tolstoj al Anna Germanovna Rozen, baronino en Estlanda gubernio de Ruslando, kiu la 8an de majo 1894 petis lin kontribui al bonfara artikolaro, eldonota profite al lepruloj. Tolstoj konsentis, sed sendis nenion, kaj la 17an de septembro la baronino reskribis pri la afero kaj proponis al li, se li ne povas sendi tekston literaturan, respondi tri ŝiajn demandojn.

Tolstoj, kuniginte ŝiajn demandojn al unu, respondis per tre zorge verkita letero (en lia arkivo restis kvar malnetaj kaj unu tajpita versioj), sendita el Jasnaja Poljana al Rozen la 26an de novembro 1894. La 18an de decembro Rozen skribis: “Bedaŭrinde, la cenzuro forprenis de mi la ĝojon vidi Vian leteron presita en nia kolekto. Oni rezolute rifuzis al ni presigi Vian respondon al miaj demandoj”. La letero do aperis en 1895 eksterlande kun du titoloj; france: *Lettre sur la raison et la religion*; kaj ruse: *О разуме и религии* (Pri racio kaj religio). Ĝin eldonis Miĥail Konstantinoviĉ Elpidin (1835-1908) en sia Ĝeneva presejo.

Ĉar ĝi estis la plej freŝa Tolstoja teksto, kunlaboranto de *Posrednik*, probable ne informita pri la cenzura malpermeso, sendis ĝian Esperantan tradukon al Zamenhof por publikigo. **Ĝi aperis antaŭ 125 jaroj, la 15an de februaro 1895 en *Esperantisto*.**

Tiutempe ĉiu eksterlanda gazeto antaŭ dissendo al Ruslandaj adresoj venis al la Poreksterlanda cenzura komitato (Комитет цензуры иностранной) en Peterburgo. Pri la cenzurado de *Esperantisto* okupiĝis Stepan (aŭtente: Étienne) Franceviĉ Gejpic (1864-99). Konstatinte, ke en *Esperantisto* aperis traduko de la letero, kies presadon la cenzuro jam malpermesis, Gejpic raportis tion al la Komitato, kiu la 1an de marto 1895 malpermesis la distribuadon de *Esperantisto* en Ruslando.

Zamenhof redaktis sian gazeton en Grodno, sed ĝi estis presata en Nurenbergo, de kie ĝi estis dissendata al la abonantoj. Pro tio li eksciis pri la malpermeso nur fine de marto (Gregorie: komence de aprilo).

Provizora malpermeso enlasi eksterlandan gazeton estis rutina afero en tiutempa Ruslando, same kiel provizora fermo de enlanda gazeto. Eksciinte pri la malpermeso, Tolstoj skribis al Nikolaj Nikolajevič Straĥov (1828-96), filozofo, publicisto kaj kritikisto, kiu en 1885-87 laboris en la Poreksterlanda cenzura komitato:

Estas certa doktoro Zamenhof, kiu inventis Esperantan lingvon kaj eldonis en ĝi revuon, ŝajne en Dresdeno. La revuo havis ĉirkaŭ 600 abonantojn, el kiuj plejmulto estis en Ruslando. Miaj amikoj, precipe unu el ili, Tregubov, granda

adepto de Esperanto, dezirante subteni la revuon, donis al ĝi mian tute sendanĝeran leteron pri la rilato de la racio al la kredo kaj ankoraŭ unu artikolon pri nepagado de impostoj en Holando. Ĝi faris tion, ke oni malpermesis enlasi la Esperanto-gazeton en Ruslandon, kaj Zamenhof, pasie dediĉinta sin al sia inventaĵo, ankaŭ pli frue malriĉiĝinta pro tio, suferis parte pro mi. Ĉu eblas klopodi por redoni al li denove la permeson por la abonado de la gazeto en Ruslando? Mi promesas, ke mi nenion publikigos ĉe li, nek iel partoprenos. (Толстой Л. Н. *Полное собрание сочинений*. Том 68. Письма 1895 [Электронный ресурс]. М.: РГБ, 2006, с. 89. Tradukis A. Korĵenkov.)

La 6an de junio Straňov respondis al Tolstoj, ke li komisiis zorgi pri tio al la konata poeto Apollon Nikolajevič Majkov (1821-97), kiu ekde 1882 ĝis sia morto estis prezidanto de la Poreksterlanda cenzura komitato.

Majkov nuligis la malpermeson, sed post la maja-junia kajero 1895, reale eldonita en aŭgusto, Zamenhof ne daŭrigis la eldonadon. Kial? Ludovikito supozis, ke kvankam nenio malhelpis al Zamenhof rekomenci la eldonadon de la gazeto, li uzis la pretekston por fermi ĝin:

Se ni trankvile foliumas tiamajn numerojn de la gazeto, ni ne povas deteni nin formuli tian opinion, ke la gazeto jam transpasis sian zeniton. Jes, ni sentas ian rutinecon de la persona gazeto. Kiom ajn la persono estus talenta, ia limo neeviteble aperas. Do, se ni kuraĝus eldiri nian opinion malkaŝe, eĉ se li daŭrigus tiun gazeton post tiu katastrofo, tio jam ne povus havi gravan signifon por la lingvo nek por la afero. Ke ĝi devis ĉesi eliradi, estis ia bonŝanco donita de ekstere. Jam venis la tempo, kiam iu entreprenu tute alikarakteran gazeton, kun kiu Ludoviko mem havos plej malmulte da rilatiĝo.

([Itô Kanzi] Ludovikito. *Historieto de Esperanto*. Tokio: Libroteko Tokio, 1998, p. 136.)


Hodiaŭ, 125 jarojn poste, vi povas relegi la tekston de Tolstoj, kiun supozeble esperantigis Ivan Miĥajloviĉ Tregubov (1858-1931), tolstojano kaj pacifisto. Li estis esperantisto №3332 en la 16a eldono de *Adresaro de la personoj kiuj ellernis la lingvon "Esperanto"*, kiu listigis la personojn, kiuj registriĝis kiel esperantistoj inter la 13a de oktobro 1893 kaj la 13a de oktobro 1895. Kiel sian adreson li, same kiel la tolstojano Jevgenij Ivanoviĉ Popov (1864-1938), indikis la adreson de *Posrednik*, menciitan en *Esperantisto*.

Kvankam la traduko de Tregubov estas plurloke fuŝa, ni publikigas ĝin en la originala formo, korektinte nur kelkajn gravajn erarojn. Dum la legado ne forgesu, ke anstataŭ la vorto "prudento" devas esti "racio".

La jarabono por 2020 kostas nur 15 eŭrojn

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Prudento aŭ Kredo?



de Lev Tolstoj

Vi volas scii mian opinion pri tio, ĉu estas dezirinde penadi per helpo de la prudento akiri en sia interna vivo plenan konsciecon kaj serĉi esprimon en vortoj de la veroj, kiujn ni spirite akiris.

Mi en la plej decida maniero respondas vian demandon jese, t. e., ke ĉiu homo, por plenumo de sia difino sur la tero kaj por atingo de vera bono (kio ĉiam iras kune), devas ĉiam ĉiujn fortojn de sia prudento streĉi por klarigado al si mem tiujn religiajn principojn, laŭ kiuj li vivas, t. e. la sencon de sia vivo.

Mi ofte renkontadis inter malkleraj laboristoj-terfosistoj, kiuj bezonas elkalkuladi kubajn mezurojn, la vastigitan konvinkon, ke matematika elkalkulado estas trompa kaj ke oni ne devas konfidi al ĝi. Ĉu pro tio, ke ili ne scias matematikon, aŭ pro tio, ke homoj, kiuj kalkuladis por ili matematike, ofte intence aŭ senintence trompadis ilin, – la opinio pri la nekredindeco kaj netaŭgeco de la matematiko por difinado de mezuroj enradikiĝis inter la malkleraj laboristoj kaj fariĝis por la plimulto el ili vero senduba, kiun ili eĉ ne trovas bezone pruvi.

Tia sama opinio fortikiĝis ankaŭ inter homoj – mi diros kuraĝe, nereligiaj – opinio, ke la prudento ne povas solvadi demandojn religiajn, ke la aluzado de prudento al tiuj ĉi demandoj estas la ĉefa kaŭzo de eraroj, ke la solvado de demandoj religiaj per la prudento estas krima fiereco.

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa printempa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La verko de H. Hodler

de Edmond Privat

Ho ve, neniam plu ni aŭdos ĉi-tie la firman voĉon de Hector Hodler, kiu tiel saĝe gvidis nin. Sed lia verko restas. Ni relegu liajn skribaĵojn, precipe liajn ĉef-artikolojn dum la milito kaj poste.

En ili ni trovos valoran instruadon por la estonto. Kiam la preskondiĉoj estos iom pli favoraj, utile estus, ilin represi. Post la Kongresaj paroladoj de Zamenhof, ili estus rekomendinda legaĵo al ĉiu esperantisto.

H. Hodler estis logika sekvanto de nia Majstro. La noblajn principojn de Zamenhof li sciis apliki al la nuna tempo kun rimarkinda sento pri realaĵoj.

Per Esperanto la genia iniciatinto de la lingvo celis starigi neŭtralan fundamenton, super kiu la homoj ĉesus esti antaŭ ĉio nacioj kaj fariĝus homaranoj. Tamen, pro lokaj cirkonstancoj, nia movado longe restadis sur la kampo de nura propagando laŭnacia.

Hodler ĝin eltiris el tiu periodo kaj organizis la supernacian grundon, kie ĉiuj individuoj rekte ekrilatas inter si sen ia diversigo pri gentoj aŭ regnoj. Tiam la rondo familia povis praktike realiĝi, kaj la lingvo estis tuj uzebla kun ĝia plena celo. Sen UEA la Esp. movado similus ĉiujn aliajn movadojn. Ĝi estus nur ia federacio de naciaj organizaĵoj, kies nur ĉefoj interrilatas inter si kaj kies popolamasoj eĉ ne havus okazon uzi mem Esperanton.

Naciaj societoj estas tre necesaj por propagandaj celoj, sed kiom pli efika estas ilia laborado, kiam ilia membraro spertas mem la utilecon de la lingvo kaj rekte inspiriĝas el konstanta internacia komunikado!



Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa printempa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



Ni daŭrigas la ciklon pri rusaj romanoj de la 20a jarcento. Post *La eta demono* de Fjodor Sologub kaj *Peterburgo* de Andrej Belyj, ĉi-foje vi povas konatiĝi kun la romano *Ĉevenguro* de Andrej Platonov.

Pri la ĉefverko de Platonov kaj ĝia stranga lingvaĵo

La tria ero en nia ciklo pri rusaj romanoj de la 20a jarcento, estas dediĉita al *Ĉevenguro* de Andrej Platonoviĉ Klimentov (1899-1951), pli konata kiel Andrej Platonov. *Ĉevenguro* (Чевенгур, 1927-28) estas lia sola nete finverkita romano. Du ampleksaj fragmentoj el la romano (ĉirkaŭ duono de ĝi), unue titolita *La konstruantoj de l' printempo*, aperis en 1928, sed la plena teksto en 1978 en Londono, kaj nur en 1988 en Moskvo. Tiam, en la perestrojka epoko estis eldonitaj ankaŭ aliaj gravaj Platonovaj prozaĵoj *Konstrufosaĵo* (Котлован, 1930), *La maro de juneco* (Ювенильное море, 1932), kaj *La feliĉa Moskvo* (Счастливая Москва, 1936).

Ĉevenguro. Pri kio temas? Plej supraĵe: pri la nelonga vivo de Aleksandro (Saŝa) Dvanov, spertinta danĝerajn aventurojn dum la postrevolucia interna milito kaj savita de Stefano Kopjonkin, adoranto de Rosa Luxemburg. Kopjonkin kaj poste Dvanov venis al la urbeto Ĉevenguro, kie triumfis komunismo kaj ĉesis la historio, kaj kies loĝantoj, restintaj post masakro aŭ forpelo de preskaŭ ĉiuj aŭtoktonoj, atendas alvenon de l' komunisma paradizo, iusence simila al la Dia Regno, Nirvano aŭ Fina Venko. Fine preskaŭ ĉiuj protagonistoj mortas en antikveca heroa maniero dum batalo kontraŭ absurdaj rajdantoj.

La nombro da studoj pri *Ĉevenguro* jam superis milion. Ni ne aldonu unu plian kaj lasu flanke la ideologiajn, religiajn, filozofiajn kaj aliajn interpretojn, sed nur menciu, ke la lingvaĵo de Platonov estas tre individua kaj malsimilega al tiuj de Tolstoj, Gorjkij aŭ Ŝoloĥov ne malpli draste (sed tute alimaniere) ol la individua lingvaĵo de Karolo Piĉ en *La Litomiŝla tombejo* malsimilas al tiuj de Engholm aŭ Szilágyi.

Ja ne eblis verki Turgenevece pri la senprecedenca starigado de la juna soveta respubliko ankoraŭ sentradicia kaj antaŭstalinisma, kaj la Platonova stilo vidiĝas ĉiupaĝe per lingvotordado, pleonasmoj, bibliismoj, kancelariaĵoj, ellasoj, ripetoj, malkongruaĵoj, fantasto, grotesko, hida naturalismo, eposeco, poezieco (Platonov debutis kiel poeto), ironio kaj sarkasmo pri altaj ideoj ktp. Ne miru do pri la "enpensigintaj haroj" de Prokofij kaj pri lia interpreto de laboro "kiel postrestaĵo de la avideco kaj kiel ekspluata-besta voluptaĵo", aŭ pri la sento de la revenanta infanaĝo de Donkiĥoto-Kopjonkin ("Kopjo" estas lanco en la rusa).

Kiel traduki ĝin? Miquel Cabal Guarro, tradukinta la romanon en la katalunan, atentigas, ke dum la rusa leganto sentas nur la strangecon de la lingvaĵo, sen dubi pri la valoro de l' verko, la kataluna leganto, frontinte ĉi tiun unuavide plumpan tekston, eble pensas, ke temas pri fuŝa traduko fare de mallerta tradukinto, kiu per sia subnivela laboro malestimias la leganton kaj la aŭtoron. La barcelona tradukisto demandas sin: "Kiel oni povas traduki Platonovon kaj ne aspekti kiel la plej sentalenta tradukisto en la mondo?" Nu, eble la plej sentalenta estas ne li, sed mi, kiu kuraĝas proponi al vi Esperantan version de fragmento el la mezo de l' romano, kiu montras la aperon de Kopjonkin en Ĉevenguro kaj (post preterlaso de kelkaj paĝoj) la rememoron de Pijusja pri la militkomunisma masakro.

Se vi ne ŝatas ĉi tiun tradukon, ne insultu la aŭtoron, insultu min!

Aleksander Korĵenkov

Ĉevenguro

Vojaĝo kun malfermita koro



Romano de Andrej Platonov: Fragmento

<...>

La blua aero ŝvebis super Ĉevenguro kiel alta sopiro, kaj la vojo ĝis la amiko superis la fortojn de la ĉevalo.

Kaptita de tristo, suspekto kaj alarma angoro, Kopjonkin decidis tuj, en ĉi tiu kruda loko, kontroli la revolucion en Ĉevenguro. “Ĉu eble ĉi tie troviĝas rezervo de banditismo?” – Kopjonkin ĵaluze pensis. – Mi tuj montrus tre draste komunismon al ĉi tiuj serpentaĉoj embuskantaj en tranĉeoj!”

Kopjonkin trinkis akvon en la kuirejo kaj komplete ekipis sin. “Vidu, eĉ la ĉevalo agitiĝas kontraŭ tiuj fiuloj! – Kopjonkin rezonis kun indigno. – Ili pensas, ke komunismo estas menso kaj profito, sed korpo mankas en ĝi, nur bagatelo kaj konkerolo!”

La ĉevalo de Kopjonkin ĉiam estis preta por urĝa milita laboro, kaj ĝi akceptis lin sur sia vasta kamarada dorso kun resona pasio de la akumulita forto.

– Galopu antaŭe kaj montru al mi la Soveton, – Kopjonkin minace diris al nekonata preterpasanto. Tiu provis klarigi sian staton, sed Kopjonkin elingigis sian sabron, kaj la viro ekkuris apud Proleta Forto. La kondukanto kelkfoje returnis sin kaj riproĉe kriis, ke en Ĉevenguro la homoj nek laboras, nek kuras, sed la pezon de ĉiuj impostoj kaj devoj portas la suno.

“Probable ĉi tie loĝas nur feriantoj el la trupo de resaniĝantoj, – Kopjonkin silente dubis. – Aŭ dum la imperia milito ĉi tie estis lazaretoj!..”

– Ĉu nun la suno kuru antaŭ la ĉevalo, kaj vi kuŝu? – Kopjonkin demandis la kuranton.

La ĉevengurano kaptis la bridon por reguligi sian intensan spiradon kaj respondis:

– Ĉe ni, kamarado, la homoj ripozas ĉi tie: nur la burĝoj iam rapidis, ĉar ili bezonis manĝaĉi kaj opresi. Sed ni manĝas kaj amikas... Jen por vi la Soveto.

Kopjonkin malrapide tralegis la enorman frambokoloran skribaĵon super la tomb-eja pordego: “Soveto de Socia Homaro de Ĉevengura Liberigita Distrikto”.

La Soveto mem troviĝis en la preĝejo. Kopjonkin rajdis laŭ la tombeja vojeto al la preĝeja sojlo. Antaŭ la enirejo estis arka skribaĵo: “Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi vin ripozigos”¹. Ĉi tiuj vortoj tuŝis la koron de Kopjonkin, kvankam li memoris, kies slogano ĝi estas.

“Kie estas mia ripozo?” – li pensis, sentante lacon en sia koro. – Sed ne, vi neniam trankviligos la homojn: vi estas ne klaso, sed persono. Nun vi estus SRano², kaj mi neniigus vin.

Proleta Forto, ne kliniĝante eniris en la friskan preĝejon, kaj la rajdanto venis surĉevale en la preĝejon kun la miro sento de la revenanta infanaĝo, kvazaŭ li retrovus sin en la avina kelo de sia naskiĝdomo. Kopjonkin jam pli frue renkontis forgesitajn lokojn el sia infanaĝo en la distriktoj, kie li vivis, vojaĝis kaj militis. Iam li preĝis en simila preĝejo de sia vilaĝo, sed el la preĝejo li estis revenanta hejmen al la forta brakumo de sia patrino. Kaj eble nek la preĝejo, nek la voĉoj de birdoj, jam mortintaj kunuloj de lia infanaĝo, nek la timigaj maljunuloj, kiuj vagis somere al mistera Kievo, – eble la infanaĝo estis ne ĉi tio, sed tiu ekscitiĝo de la infano, kies patrino estas vivanta, kaj la somera areo odoras je ŝia juposubo; en tiu aŭrora tempo ĉiuj maljunuloj vere estas misteraj, ĉar iliaj patrinoj mortis, sed ili vivas kaj ne ploras.

Je la tago, kiam Kopjonkin enrajdis en la preĝejon, la revolucio estis eĉ pli malriĉa ol la kredo, kaj ĝi ne povis ŝirmi la ikonojn per ruĝa ŝtofo: la Eternulo Cebaot, pentrita sub la kupolo, rigardis rekte al la ambono, kie okazis la kunvenoj de la revkomo³. Nun sur la ambono, ĉe la akre ruĝa tablo sidis triopo: prezidanto de la Ĉevengura distrikta plenumkomitato Ĉepurnyj, junulo, kaj virino kun gaja kaj atenta vizaĝo, kvazaŭ ŝi estis komunistino el la futuro. La junulo, havanta sur la tablo la taskolibron de Jevtuŝevskij⁴ kiel konsultlibron, estis pruvanta al Ĉepurnyj, ke la suna forto certe sufiĉos por ĉiuj, ĉar la Suno dekduoble pli grandas ol la Tero.

– Vi, Prokofij, ne pensu – estas mi, kiu pensos, sed vi formulu! – Ĉepurnyj ordonis.

– Kamarado Ĉepurnyj, vidu mem: por kio la homo moviĝu, ja tio ne laŭas la sciencon? – la junulo senhalte klarigadis. – Se oni kolektus ĉiujn homojn por komuna atako, eĉ tiam ili estus kontraŭ la forto de l’ suno, kiel unu privata kamparano kontraŭ agrikultura komunumo. Mi certigas vin, ke tio estas senutila afero!

Ĉepurnyj fermetis siajn okulojn por koncentri siajn pensojn.

– Ion vi ĝuste parolas, sed ion mensogas. Karesu Klaŭdinjon en la altarejo, sed mi okupiĝos pri miaj antaŭsentoj, ĉu estas tiel aŭ aliel!

Kopjonkin bridis la pezan paŝadon de sia ĉevalo kaj deklaris sian intencon senpacience kaj senprokraste trakribri la tutan Ĉevenguron, en kiu eble kaŝiĝas kontraŭrevolucia nesto.

– Vi ĉi tie tre saĝas. Sed en la saĝo ĉiam troviĝas ruzo por opresado de la pacema homo.

Kopjonkin tuj rekonis la junulon kiel ĉasbeston: nigraj netravedeblaj okuloj, sur la

vizaĝo videblas malnova ekonomia menso, kaj meze de l' vizaĝo estas malfermita, flaranta kaj hontinda nazo, – sed la nazoj de la komunistoj estas kiel bastoŝuoj, kaj la okuloj pro la fido estas grizaj kaj pli parencaj.

– Sed vi, ulo, estas ŝtelisto, – Kopjonkin rivelis la veron. – Montru viajn dokumentojn!

– Jen, kamarado! – la junulo tute afable konsentis.

Kopjonkin prenis la kajeretojn kaj foliojn. Laŭ ili antaŭ li estis Prokofij Dvanov, partiano ekde aŭgusto de la 1917a jaro.

– Ĉu vi konas Saŝan? – Kopjonkin demandis, provizore pardonante lian premantan vizaĝon pro la familinomo de la amiko.

– Mi konis lin, kiam mi estis infano, – la junulo respondis, ridetante pro sia troa saĝo.

– Do, Ĉepurnyj donu al mi paperfolion – necesas Saŝan inviti ĉi tien. Necesas kunfrapi unu saĝon kontraŭ alian, por ke disŝutiĝu fajreroj de komunismo...

– Sed ĉi tie la poŝto estas nuligita, kamarado, – Ĉepurnyj klarigis. – Homoj en amaso loĝas kaj persone intervidiĝas; bonvolu diri: por kio ili bezonus poŝton? Ĉi tie, frato, proletoj estas jam tute unuigitaj!

Kopjonkin ne tre domaĝis la mankon de la poŝta servo, ĉar dum sia vivo li ricevis du leterojn, kaj nur unufoje leteris mem, kiam en la imperiisma milito li eksciis, ke lia edzino mortis kaj do necesis defore funebri ŝin kun la familianoj.

– Ĉu iu povos marŝi al la gubernia ĉefurbo? – demandis Kopjonkin al Ĉepurnyj.

– Ni havas tian piediranton, – Ĉepurnyj rememoris.

– Kiu li estas, Ĉepurnyj, – vigliĝis la virino, kara por ambaŭ ĉevenguranoj. Ja vere kara: eĉ Kopjonkin eksentis, ke se li estus juna, li brakumus tiun virinon kaj longe tenus ŝin senmove. Ĉi tiu virino eligis malrapidan kaj friskan animtrankvilon.

– Miĉjo Luj! – Ĉepurnyj memorigis. – Li vojaĝemas! Sendita al la gubernia ĉefurbo, li atingos Moskvon aŭ Ĥarkovon, kaj li revenas, kiam la sezono finiĝas – aŭ floroj ekfloras, aŭ neĝo kovras la teron...

– Por mi li iros pli rapide, mi donos al li komision, – Kopjonkin diris.

– Li iru, – Ĉepurnyj permesis. – La vojaĝado por li estas ne laboro, sed nur evoluigo de l' vivo!

– Ĉepurnyj, – la virino diris al li. – Donu al Luj farunon por interŝanĝi, li reportos al mi ŝaleton.

– Ni donos ĝin, Klaŭdia Parfjonovna, nepre; ni uzos la eblon, – Prokofij trankviligis ŝin.

Kopjonkin skribis al Dvanov per tajpeskaj literoj.

“Kara kamarado kaj amiko Saŝa! Ĉi tie estas komunismo, kaj denove: necesas, ke vi rapide venu al ĉi tiu loko. Nur la somera suno laboras ĉi tie, kaj la homoj nur neamare amikas, kvankam inoj penas elĉantaĝi ŝaletojn, kaj per tio ili klare malutilas malgraŭ sia agrableco. Via frato aŭ samfamiliano tute ne plaĉas al mi. Sed mi

vivas kiel dubjekto⁵, ial pensas nur pri mi mem, ĉar oni tute ne estimas min. Eventoj mankas – oni diras, ke tio estas scienco kaj historio, sed ne estas konate.

Kun revol. respekto *Kopjonkin*.

Venu por levi la komunan ideocon!"

– Ial mi plu pensadas pri io, imagas ion, aŭ ŝajnas al mi ke mi vidas ion... Malfacile batas mia koro! – Ĉepurnyj turmente parolis al la malhela preĝeja aĉero. – Eble ĉe ni komunismo estas en ordo, sed eble ne en ordo! Ĉu mi veturu al kamarado Lenino, por ke li persone formulu por mi la tutan veron?

– Endas veturi, kamarado Ĉepurnyj! – Prokofij jesis. – Kamarado Lenino donos al vi sloganon, vi prenos ĝin kaj alportos ĉi tien. Ja estas absurde pensi nur per mia kapo: ankaŭ la avangardo laciĝas! Kaj, krome, kompanse mi ricevas neniun avantaĝon!

– Diru sincere, ĉu vi ne konsideras mian koron? – Ĉepurnyj ofendiĝis.

Evidente Prokofij alte taksis la forton de sia menso, kaj li ne perdis sian firman trankvilon.

– Kamarado, Ĉepurnyj, la sento estas amasa afero, sed la penso estas organizo. Kamarado Lenino mem diris, ke la organizo plej gravas por ni...

– Mi ja turmentiĝas, sed vi meditas – kio pli malbonas?

– Kamarado Ĉepurnyj, ankaŭ mi veturos kun vi al Moskvo, – la virino deklaris.

– Mi neniam vidis la centron, oni diras, ke tie estas mirindaj ioj!

– Jen la fino! – Kopjonkin elbuŝigis. – Vi, Ĉepurnyj, ŝin konduku rekte al Lenino kaj diru: "Jen por vi, kamarado Lenino, virino altigita ĝis komunismo!" Vi estas aĉuloj!

– Kio do? – Ĉepurnyj alarmiĝis. – Ĉu laŭ vi ĉe ni io ne tielas?

– Jes ja, ne tielas!

– Sed kielas, kamarado Kopjonkin? Miaj sentoj jam laciĝis.

– Ĉu mi scias? Mia tasko estas detruo la malamikajn fortojn. Kiam mi detruos ilin, tiam ĉio ĉe ni mem iĝos tia, kia devas esti.

Prokofij fumis kaj eĉ unufoje ne rompita la paroladon de Kopjonkin, pensante kiel eblas aligi al la revolucio ĉi tiun neorganizitan armitan forton.

– Klaŭdia Parfjonovna, ni iru promeni kaj iomete petoli, – kun strikta ĝentilo Prokofij proponis al la virino. – Por ke vi ne malfortiĝu!

Kiam ĉi tiu paro venis al la preĝeja sojlo, Kopjonkin fingromontris ilin al Ĉepurnyj.

– Burĝoj, sciu tion!

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa printempa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kurba

Novelo de Paulo Sérgio Viana



Malgrasa, kurba, iranta tra la urbo en ĉiutaga, senfina pilgrimado, kun la okuloj fiksitaj al la grundo, vestita per grizkotona robo longa kaj malstrikta. Ĉe la talio, ŝi portis etan tolsakon kun la aperturo fermita per malpura ŝnureto. Ŝia aĝo estis nedifinebla, je ia punkto en la dua duono de la vivo. Kurba vivo.

Ŝi vagadis tra ĉiuj stratoj, prefere tra plej homplenaj, per nelongaj, ofte interrompataj paŝoj, kaj ŝi kolektadis malgrandajn objektojn, kiujn la homoj kaj la hazardo faligis al ŝi survoje. Fine de ĉiu tago, ŝi revenis hejmen, nome al domaĉo en la ĉirkaŭaĵo de la mondo, por kontroli kaj meti en ŝuskatolojn, tre organizita kaj klasigita, la tagan kolekton. Ŝi havis skatolon por vestbutonoj, alian por moneroj, tiun por harpingloj, por orelingoj, skribilfermiloj, nerompitaj globkrajonoj, krajonstumpoj, kudriloj, vinkorkoj, harfiksiloj, infansuĉiloj, malplenaj fajriloj, pecoj de ŝnuretoj, ŝlosiloj, paperklipoj, fadenbobenoj, vitraj globetoj, kandelstumpoj.

Ne malofte, Kurba vidis ion, kio ŝajne taŭgis, tiam ŝi sin klinis malrapide, kun la manoj sur la dorso, ekprenis la trovitaĵon, ekzamenis ĝin longe, iom pripensis kaj reĵetis ĝin surgrunden; ĝi ne taŭgis. Tio signifis ian kriterion, ian limon inter tio, kio meritis eniri la saketon (kaj poste la ĝustan departementon) kaj tio, kio estis nenio alia ol spitinda rubo. Tiel Kurba ne akceptis simplajn ŝtonetojn, bruligitajn alumetojn, cigaredstumpojn, paperpecojn (eĉ se kolorajn), plastajn sakojn, bierajn aŭ alibotelajn ŝtopilojn. Ankaŭ ne ĉifonojn. Kaj ankaŭ ne objektojn tiel nedifinitajn, ke oni ne povus identigi ilian devenon, ilian originan utilecon.


Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa printempa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Troa tago

Novelo de Miĥail Korotkov



1

Sonoris la vekhorloĝo. Mi, ne apertante la okulojn, malvigle etendis manon kaj premis butonon. Poste sentis, ke ĉe miaj piedoj, kiuj elstaras de sub litkovrilo, frotiĝas Baloro.

“Ha, sentaŭga kato, – mi ridetis, – li tamen superfortis la kuirejan pordon kaj aperis”. Mi ĉiam fermas lin tie por nokto, por li ne venu kaj ne malhelpu dormi. Mi sidiĝis sur la lito, volis preni Baloron en manojn kaj riproĉi. Sed kiam mi malfermis la okulojn – timege retiris la manon. Anstataŭ nia griza-blanka Baloro ĉe miaj piedoj sidis kaj indiferekte lavis sin dika katego, nigra kiel peĉo.

“Kiu diablo! Ĉu tiu penetris tra la ventolgiĉeto?” Laŭ mia dorso kuris malagrabra vento. Hieraŭ vespere tiu kato ne estis. Se estus hejme Nataŝa kaj Vika, mi opinius, ke ili alportis ĝin, kvankam ili tian deziron neniam montris, ni havas sufiĉe da zorgoj kun Baloro. Se mi hieraŭ vespere venus, ekzemple, post amika drinkado “apenaŭ viva”, mi povus, ne rimarkinte, enlasi lin en la pordon. Sed mi hieraŭ ne pekis, eĉ botelon da biero ne trinkis. Mi legis, preparis vespermanĝon, ian ordigon faris.

Mi levis min kun deziro elĵeti tiun neinvititan gaston sur la ŝtuparon, sed tio, kion mi ekvidis, devigis min ankoraŭ pli konsterniĝi. En la mezo de la ĉambro kuŝis, substerninte ian ĉifonaron, nerazita viraĉo, malpura kaj fiodora kiel senhejmulo.

Dum kelkaj sekundoj mi ne decidis alpaŝi al li, poste mi kuraĝis kaj abomeneme tuŝis per mia piedo lian ŝultron. Li malfermis la okulojn, sidiĝis kaj mire ĉirkaŭrigardis la ĉambron. Mi ne sciis, kion atendi de li, tial mi konvinkiĝis, ke miaj halteroj kuŝas sur sia loko, en ekstrema okazo ili estos utilaj.

– Kiel vi trafis ĉi tien?
– Mi ne memoras. – Li skuis la kapon kaj kulpe ridetis, kvazaŭ li volus diri: nu, superdrinkis mi hieraŭ, kion do, pardonu, bona homo.

Mi plilaŭtigis la voĉon:

– Nu, kiel vi ĉi tien trafis, vi ne memoras, sed kion vi memoras? Ĉu vi memoras almenaŭ, kiu vi estas?

– Homo, kiel vi vidas... – li ĉiam same kulpe, kiel al sia amiko, ridetis.

– Nu vi, aĉulo, ĉu vi komprenas almenaŭ ion?

Bati sidantan homon, kvankam li estas kanajlo, tamen ne decas, mi kaptis lian fiodoran ĉemizon kaj starigis lin.

– Fu, forlasu min! – Li forŝiris sin, saltis sur la liton, poste en la fendon inter la lito kaj la muro – kaj malaperis...

Ahem... fabeloj. Nun la instruita kato, verŝajne, komencos paroli ion. Li ĉiam ankoraŭ sidis sur la lito.

– Nu, kion vi diros? Ĉu ankaŭ vi estas el tiu fikompanio?

La kato ekkriis, kvazaŭ oni piedpremigus lian voston, saltis malantaŭ la liton kaj malaperis inter la muro kaj la plankoplinto.

Kio do ĉio ĉi estas? Kial tiu tuta idiotaĵo devis okazi, kiam mi restis hejme sola, mi ne havas eĉ iun por rakonti. Sed Nataŝa kaj Vika ne kredus je tiu absurdaĵo. Jen ĵus estis viraĉo kaj kato, kaj – nenia postsigno.

Mi volis preni de la tablo liniilon por palpi per ĝi inter la muro kaj la plinto, kaj done konsterniĝis. La aĵoj de la trampo ja restis. Li dormis sur ia malnova palto kun duone senhara astrakana kolumo, kaj apude staris lia dorsosako, polurbrilanta pro malpuraĵo. Mi eksidis sur la liton, la unua penso estis la plej ĉiutaga: ĉu ne alportis la trampo pedikojn? Estus necese elporti la ĉifonaron en rubujon, sed kiel ĝin tuŝi?

Dum mi tion pripensis, knaris la enira pordo. Kia diablo? La torento de neinvititaj gastoj ne finiĝis. La pordo ja estis ŝlosita! Mi venis en la antaŭĉambron. Tie staris knabino proksimume dekdujara.

– Onklo Vlado, la patrino sendis min pruntepreni de vi iom da terpomoj.

Ahem, ŝi, ŝajnas, bone konas min, sed mi vidas ŝin unuafoje. Sed ĉu mi enketu la infanon: kiu estas vi kaj kiu estas via patrino?

En la kuirejo, saturita per odoro de io nebongusta, min kun rideto renkontis dika flavhara virinaĉo. Mi plian fojon por momento konsterniĝis, sed, kunpremite la dentojn, reregis min kaj simple diris, kvazaŭ ĉio estus en plena ordo:

– La infano bezonas terpomojn, – kaj poste adresis al la knabino: – Kial vi ne prenis sakon, en kiun meti?

– Ha, donu al mi tute iomete kaj volvu en ĵurnalon.

Kia ĉarmo estas tiu knabino!

Mi elmetis el kesto kaj volvis en ĵurnalon kvin-ses grandajn terpomojn. La knabino dankis kaj forkuris. Ahem...

– Kaj nun mi aranĝos ordon kun vi, sinjorino. Nu, unue, la plej simpla kaj natura demando: kiu vi estas?

– Vi daŭrigas viajn stultaĵojn. Prefere ni ne daŭrigu. – Ŝi iom silentis. – Jen mi preparis al vi ovaĵon kun haringo kaj kafon. Manĝu, dume ĉio ne malvarmiĝis.

– Aŭskultu, vi, dika simio!.. – Estis ega deziro ĵeti sur ŝian fizionomion la paton,

sed mi detenis min. Poste mi prenis la paton kaj elĵetis en la rubujon tion, kio en ĝi estis. La kafon, aŭ kio tie estis anstataŭ ĝi, mi elverŝis en la deflukuvon.

– Almenaŭ ili laboru profesie, kiuj sendis ĉiujn vin. Por ĉiu okazo komuniku al ili: en nia familio neniu manĝas ovaĵon kun haringo, kaj kafon ni ankaŭ ne amas. Se vi volis veneni, vi devus elekti ion pli bongustan.

Sur la vizaĝo de la virino – pli volonte mi nomus ĝin porkina muzelo – aperis sincera ĉagreno.

– Kial vi elĵetis? Vi paŭtas kontraŭ mi, sed ĉu ankaŭ kontraŭ manĝaĵoj? Mi mem manĝus.

Ahem, ŝi senarmigis min per sia mildeco. Antaŭ unu minuto mi volis ĵeti la paton sur ŝin, kaj poste bati tiun porkinan muzelon, ĝis ĝi transformiĝos al sanga miksaĵo. Sed nun miaj manoj malleviĝis. Ne decas tio por viro. Jes, ŝi tre similas al porka muzelo, tamen ŝi estas virino.

Mi decidis, ke estas sensece voki policon, mi povas trafi en ridindan situacion. Tiu virinaĉo malaperos en la fendo inter la muro kaj la plinto kiel tiu trampaĉo. Mi ne dubas, ke ĉiuj ili, inkluzive de la knabino kaj la kato – ĉiuj estas unu bando.

– Jen, sinjorino, – mi diras, – mi ne scias, kion fari kun vi plu. Elĵeti vin el la loĝejo, mi opinias, estas sensece, ĉar ŝlosita pordo por vi ne estas obstaklo. Mi ne scias, kiu vin sendis, kion vi intencas, por ĉiu okazo mi donas informon: ni ne havas ion interesan por via bando. Komputero, televidilo, magnetoskopo – ĉio estas tiel malnova, ke neniu ilin aĉetos. Nia tuta vestaĵo estas portita. Librojn nun estas varo ne multe aĉetata, kaj tiuj, kiuj estas, valoras nur por mi. Oron ni ne havas. Ioma mono estas, sed ĝi estas en banko. Kvankam... por kia diablo mi instruas vin, vi ne estas stultuloj kaj ne bezonas mian instruadon. Kaj vi atakis min, verŝajne, ne pro aĵoj kaj mono. Sed pro kio? Dume mi ne scias. Sed mi pripensos la situacion. Mi, sciui, ne ĉagreniĝas kontraŭ menskapabloj. Ni rigardu, kiu superos.

Ŝi aŭskultis min kaj humile palpebrumis per siaj porkaj okuletoj. Ŝia nura avantaĝo estas la humileco, virina malforteco. Aliaj avantaĝoj forestas. Ili povus sendi ĉarman belulinon, por ke viro lasu sin delogi, sed ne ŝtipon kun porka muzelo.

2

Mi ne povis daŭrigi tiun sensencan konversacion, estis tempo iri al laboro. Elirante el la loĝejo, mi renkontis naz-al-naze liveristinon de telegramoj. “Bone, ke mi trafis ĝustatempe. Subskribu”.

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa printempa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ina kuraĝo



Rakonto de Julian Modest

Magdalena estis energia, lerta kaj kapablis solvi ĉiujn malfacilajn problemojn. Ŝi ne havis edzon, ŝi mem zorgis pri sia filo kaj helpis siajn gepatrojn, kiuj jam estis maljunaj. En la fabriko por infanaj ludiloj, kie Magdalena laboris, ĉiuj estimis ŝin. Ja ŝi estis sperta laboristino, agis rapide kaj helpis la virinojn, kun kiuj ŝi laboris. Onklino Kina, la plej aĝa virino en la fabriko, ofte diris al Magdalena:

– Magdalena, tre bela vi estas, sperta, lerta, ĉiam vi kare ridetas, kial vi ne edziniĝos denove? Ja, vi devas havi edzon, kiu helpu vin.

– Tio certe okazos, onjo Kina, – respondis Magdalena, – sed pro la laboro mi ne havas tempon serĉi edzon.

Tamen la fabriko ĉesis funkcii, kaj Magdalena ne plu laboris. Ŝiaj gepatroj serioze maltrankviliĝis.

– Magdalena, – diris ŝia patrino. – Kiel ni vivos nun? Vi ne plu laboras, niaj pensoj estas malaltaj kaj ni ne povas helpi vin.

– Panjo, ne maltrankviliĝu. Mi ĉiam sukcesis solvi la problemojn, kaj same nun mi sukcesos. Se oni deziras labori, oni nepre trovos laboron.

Kaj Magdalena rapide solvis la problemon. En la loĝkvartalo estis malgranda nutraĵvendejo, Magdalena luis ĝin, kaj ŝi mem iĝis vendistino en la vendejo, kie oni povis aĉeti panon, fromaĝon, kolbasojn, konservitajn nutraĵojn... La homojn, kiuj venis en la vendejon, ŝi renkontis afable, ridete, ŝi estis ĉarma, kaj multaj ŝatis aĉetadi en ŝia vendejo.

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa printempa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Jes, sed alvenos ja la tago



Poemo de Miguel Fernández

Memore al la hispana kantpoeto José Antonio Labordeta,
mortinta pro ago de la sama murdema kankro,
kiu ankaŭ min vundis antaŭ kelkaj jaroj

(1)

Matenruĝo alvenis. Duonsvena,
mi min fordonis al timata nepro.
Odoro je... sulfuro?, kirurgaj maskoj... blankaj?... verdaj?...
“Spiru!”... “Forte!”... “Tiele!”... “Ĉio iras bonorde!”...
... ..

(2)

Kaj vekiĝo metala kaj sengusta.
Jen ade zumas ia mezurilo.
Tuboj... juko ĉepojna... kaj sondilo.
Jen mia sekso dresita: trapikita.
Aj, ne doloro, sed ĝeno superhoma!
Flegistino alvenas kvietige.
Prenas noton, revenas ĉe sian tablon, skribas...
Ŝi belas kaj teneras, mi dormemas.
...
Venas, notas, revenas ĉe sian tablon, skribas
...
Sidas plue ĉetable, ĉiam skribas.
... ..

(3)

Nun mi portatas al etaĝo kvara.
“Ĉio bonordas”, ĉiuj diras. Kisoj.
Kiom da amo! Fenestregoj. Strato.
Aŭtoj kaj motorcikloj. Piedirantoj. Muto.
Kvazaŭ temas pri filmo de l' granda Buster Keaton.
Najbar', matene operaciita,
ellasas ronkon plendan. Ĝene fortan.
Mi vekigis. Jam noktas...

...

Mi venas re al la silenta filmo
kaj la ceteraj sonĝoj.

... ..

(4)

Jam pasis du semajnoj.
Fine mi estas jam unu el ili.
La fakton mi komence ne akceptis.
Ho, ne, onkologio!
Tio neniel povus min rilati.
Iu tute eraris.
Tiaĝo estas nur por aliuloj.
Kuracisto konfirmis: “certe jes, mi bedaŭras”
Efluvo gal-amara
kreskadis de la brusto ĝis la gorĝo,
kiel kreskas ciklono,
kiel kreskas teruro,
kiel kreskas l' angoro de mortokondamnito,
kiel kreskas kaj ŝaŭmen disrompiĝas
ondego plej surpriza
al plej sperta surfisto terurita,
kiel kreskas aflikto nokte nigra
en *Adagio for Strings* de Samuel Barber,
tia usone flamenka¹ muzikpeco.

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa printempa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Nia libroproduktado en la 2019a jaro

Enkonduko ĉiujare ripetata (ne legu, se vi delonge abonas)

Ekde sia renaskiĝo *La Ondo de Esperanto* ĉiujare publikigas statistikon de la libroproduktado en Esperantujo, daŭrigante la iniciaton de Vilmos Benczik en la Budapeŝta revuo *Hungara Vivo*. Por tiuj, kiuj unuafoje abonas *La Ondon*, ni ripetu kelkajn enkondukajn frazojn, kiujn prefere ne legu niaj konstantaj abonantoj.

La bazo de nia statistiko estas la rubriko “Laste aperis” en la revuo *Esperanto*, en kiu estas registrataj ĉiuj libroj, kiujn la libroservo de UEA ekvendis en la aktuala jaro. La jartabelojn akompanas resumaj tabeloj por la 29-jara periodo de nia statistikado (1991-2019).

Tia statistiko ja estas kritikebla kaj kritikinda.

Unue, en “Laste Aperis” estas registrataj pluraj libroj, eldonitaj antaŭ kelkaj jaroj sed ekvenditaj de UEA en la koncerna jaro, ekzemple, ĉar la eldoninto ne tuj post la eldono sendis specimenon al Roterdamo. Tio povas doni misan bildon pri la revuata jaro, sed la resuma statistiko glatigas la fluktuaĵojn kaj fidine vidigas la ĉefajn tendencojn en nia eldonado.

Due, la libroservo de UEA vendas ne ĉiujn novajn Esperanto-librojn, kaj en “Laste Aperis” kutime mankas, ekzemple, lerniloj eldonitaj por landaj bezonoj (ekzemple, lernolibroj por ĉinoj) kaj etkvante eldonitaj broŝuroj, kiujn la aŭtoroj disvendas kaj disdonacas en siaj kluboj kaj renkontiĝoj. Same mankas en “Laste Aperis” kongreslibroj, programbroŝuroj kaj jarlibroj, kiuj abunde aperas ne por vendado en libroservoj, sed por disdono al la respektivaj kongresanoj kaj asocioj.

Trie, ekster la statistiko restas la bitlibroj, kiujn la aŭtoroj (kutime, senpage) ofertas en la virtuala mondo sen zorgi pri papera eldono por ne pagi la eldonkostojn. Tio reduktas la rikolton de libroj paperaj.

Sed dume mankas pli granda statistika bazo ol la kritikebla “Laste Aperis”.

Ordinara jaro kun 150 “novaj” libroj

Jaro	Libroj	Paĝoj	Jaro	Libroj	Paĝoj
1991	222	26.091	2006	204	30.078
1992	205	25.789	2007	184	31.183
1993	136	18.511	2008	158	25.381
1994	188	22.078	2009	158	24.272
1995	200	23.345	2010	204	28.232
1996	232	28.637	2011	172	19.775
1997	273	27.727	2012	153	23.144
1998	208	28.769	2013	178	25.344
1999	208	24.460	2014	107	14.024
2000	235	25.869	2015	172	25.629

2001	222	31.520	2016	189	32.323
2002	174	26.451	2017	139	23.353
2003	224	28.424	2018	127	19.483
2004	183	27.295	2019	150	28.194
2005	159	23.780			

Dum la lasta jardeko de la 20a jarcento averaĝe aperis 210 libroj jare, dum la unua jardeko de la 21a jarcento la averaĝo estis 191 libroj, kaj en la komencaj naŭ jaroj de la nuna jardeko (2011-19) “laste aperis” 1387 libroj, aŭ nur 154 libroj jare.

Laŭ “Laste Aperis” en 2019 surmerkatiĝis 150 libroj kun 28.194 paĝoj, sufiĉe kutima jaro laŭ la nombro de la libroj kaj bona jaro laŭ la paĝonombro. La libroj estis sufiĉe ampleksaj, inter ili estas nur 22 broŝuroj malpli ol 49-paĝaj.

La ĝenra distribuo estis sufiĉe kutima kun tradukitaj beletraĵoj kiel la plej populara librospeco; atentindas, ke la rikolto de la originala beletro estis pli bona ol kutime.

La Lutermana epoko, ĉu finita?

En dek el la dek unu lastaj jaroj la plej aktiva Esperanto-eldonejo estis MAS (Monda Asembleo Socia), prizorgata de Vilhelmo Lutermano, kiu eldonas plejparte politikajn kaj sociajn verkojn de maldekstraj aŭtoroj, sed ankaŭ beletron. Sed ĉi-jare registriĝis nur tri novaj Lutermanaj libroj, kaj en la unuaj lokoj laŭlibre kaj laŭpaĝe estas la Nov-Jorka eldonejo *Mondial* – ĝi unuafoje grimpis tiel alten. Ĉu porlonge?

	1991-2015	2016	2017	2018	2019	1991-2019 Sume aŭ averaĝe
Nombro de libroj en/pri Eo	4802	189	139	127	150	5407
Suma paĝonombro	635.808	32.323	23.353	19.483	28.194	739.151
Nombro de la eldonintoj	1162	75	64	55	84	1247
Averaĝa paĝonombro de 1 libro	132	171	168	153	188	136
Averaĝa prezo de 1 libro (eŭroj)	10,00	12,84	13,01	12,45	13,37	10,33
Lernolibroj, vortaroj k. s. pri Eo	699	20	26	7	18	770
Originala beletro	562	30	15	26	33	666
Traduka beletro	997	28	32	32	41	1130
Lingvistiko, esperantologio	555	23	14	9	8	609
Eo: historio, kulturo, movado k. s.	639	28	17	14	12	710
Politiko, historio, filozofio, socio	513	34	26	24	21	618
Scienco kaj tekniko	294	5	1	3	2	305
Religio	235	14	5	6	10	270
Aliaj temoj	308	7	3	6	5	329

2019. Libroj		2019. Paĝoj	
Mondial (USA)	11	Mondial	2694
KAVA-PECH (Ĉeĥio)	8	Yanshan (Ĉinio)	1717
Ars Libri (Pollando)	6	Esprima.com.br (Brazilo)	1598
BES (Pollando)	6	KAVA-PECH	1519
Horizonto (Japanio)	6	J. Hauser (Slovakio)	1196
Libro-Mondo (Pollando)	6	JEI (Japanio)	1101
Lorenz (Brazilo)	5	Lorenz	1061
Espero (Slovakio)	5	Ars Libri	856
DEC (Kroatio)	5	BES	856
La Karavelo (Brazilo)	5	Libro-Mondo	856

Okaze de komuna eldono, estas konsiderataj ĉiuj kuneldonitaj eldonejoj/landoj; ĉi-jare pro tiaj eldonaĵoj, realigitaj de Josip Pleadin kaj Tomasz Chmielik, en la listo estas Dokumenta Esperanto-Centro (Kroatio) kaj tri eldonejoj el Pollando. Unuafoje en nia statistiko aperis la Pekina eldonejo Yanshan, eldoninta la kvarvoluman rakontaron *La strangaĵoj de Liaozhai* de Pu Songling, kaj Július Hauser, eldoninta sian grandan slovakon-Esperantan vortaron.

Antaŭ du jaroj MAS rompis la unualokecon de UEA en la resuma librolisto 1991-2018 kaj de FEL en la resuma paĝolisto. Por 1991-2019 MAS restis la unua en la librolisto, sed *Mondial* devancis ĝin en la paĝolisto.

1991-2019. Libroj		1991-2019. Paĝoj	
MAS	192	Mondial	28201
UEA (Nederlando)	167	MAS	26876
Libro-Mondo	157	FEL	24542
Fonto (Brazilo)	140	Fonto	23468
FEL (Belgio)	134	Libro-Mondo	21741
Mondial	134	UEA	20932
Impeto (Ruslando)	123	KAVA-PECH	19057
Edition Iltis (Germanio)	116	Impeto	18895
KAVA-PECH	109	Sezonoj	14586
Sezonoj (Ruslando)	88	AEP (Svislando)	12789

Bona jaro por Brazilo

Pro la (ĉu provizora?) malaktiviĝo de MAS, post la dekonujara sinsekva dominado de Francio, la lando de Hachette perdis sian unuan lokon titole kaj paĝe, kaj ilin nun okupas Brazilo, al kio kontribuis ankaŭ la minilibretoj de Esprima.com.br, kiuj en la kutimaj dimensioj kune ampleksus eble malpli ol 300 paĝojn.

2019. Libroj		2019. Paĝoj	
Brazilo	22	Brazilo	4531
Francio	15	Ĉinio	2857
Japanio	14	Usono	2844

Usono	13	Japanio	2377
Ĉeĥio	12	Slovakio	2123
Pollando	10	Ĉeĥio	2045
Italio	8	Francio	1585
Slovakio	8	Italio	1521
Hispanio	8	Litovio	1289
Ruslando, Belgio k.a.	6	Hispanio	1250

Francio daŭre avangardas en la resuma listo por 29 jaroj. Germanio, kiu ĝis 2009 estis la unua, daŭre malprogresas, sed ankoraŭ restas la dua.

1991-2019. Libroj

Francio	704
Germanio	463
Pollando	372
Nederlando	336
Brazilo	326
Ruslando	308
Japanio	303
Usono	285
Italio	206
Belgio	179

1991-2019. Paĝoj

Francio	77.770
Germanio	54.219
Brazilo	52.968
Japanio	51.674
Ruslando	45.451
Pollando	44.128
Usono	40.794
Nederlando	38.939
Italio	30.895
Belgio	29.998

Fontolingvoj

60 el la 150 libroj (40%) estas tradukoj. Ĉi-jare supre de la lingvolisto estas la fontolingvoj ĉina kaj hispana, el kiuj esperantigitaj estis po sep libroj, sekvas la germana kaj japana (po ses). El Esperanto alilingven estis tradukitaj ses libroj. La germana lingvo konservis sian gvidan pozicion en la fontolingva listo por la 29-jara periodo.

Dum 1991-2019 aperis 172 libroj tradukitaj el Esperanto.

Germana	253	Portugala	74
Franca	217	Japana	71
Angla	164	Hispana	68
Rusa	109	Ĉina	65
Pola	84	Itala	61

Kiuj verkis kaj tradukis?

Vilhelmo Lutermano plurjara ĉampiono inter la aŭtoroj kaj tradukintoj, ĉi-foje mankas inter niaj plej fruktodonaj aŭtoroj. Po kvin libroj aperis de la Esperantisto de la Jaro 2018a Hori Jasuo (tri originaloj kaj du tradukoj) kaj de Miguel Fernández (unu originalo kaj kvar tradukoj).

Ne demandu min pri la enhavo de la libroj; mi, manietulo, nur nombris ilin.

Aleksander Korĵenkov

Oskaro kaj la mondo

de Wolfgang Kirschstein

Ĉiujare la usona filmakademio faras grandegan feston por si mem. Multaj interesatoj ĉie en la mondo emas sekvi rekte, ĉu en televido ĉu en kinejoj. En mia regiono oni povas iri malfrue en la “Oskar-nokto” al kinejoj por komence spekti unu el la premiotaj filmoj. Ĉirkaŭ la noktomezo la solenaĵo komenciĝas. Eblas gapi al la kostumoj de diversaj stelulinoj kaj ekscii, kies vestaĵoj estas aŭdacaj aŭ embarasaj. Sed poste tamen temas precipe pri filmoj.

La Oskar-premioj estas – iuj dirus: bedaŭrinde – tiom gravaj, ke eĉ la nomumo (kandidatigo) estas konsiderata kiel kvazaŭ-premio. Ĉi-jare nur kvar filmoj ricevis entute 41 nomumojn. Ili estis *1917* (10), *La Irlandano* [The Irishman] (10), *Iam ... en Holivudo* [Once Upon a Time ... in Hollywood] (10) kaj *Joker* [Ĵokero] (11).

La Irlandano

La Irlandano de Martin Scorsese gajnis nenion, eble ĉar Netflix, la giganto de elsendofluoj, donis monon por produkti ĝin. La grandaj produktadkompanioj ne volonte donas monon por ambiciaj projektoj kun eble ne garantiita profito. Furoro en kinejoj estas nuntempe filmaj versioj de bildstriaĵoj rakontoj, sed ne la subtilaj dramoj. Unuflanke, “la industrio” konsideras Netflix-on detruanto de kinejoj; aliflanke, ili mem subfosas la estontecon de kinejaj filmoj kaj puŝas reĝisorojn al sia “malamiko”. Kaj iom post iom ili ankaŭ forpuŝas ŝatantojn de filmoj. Ankaŭ en 2019 Netflix havis fortan kandidateton en la konkurso, nome *Roma* de Alfonso Cuarón. Tiu filmo estas por la granda ekrano, sed ve, ankaŭ Cuarón ne trovis monon por la filmo pri siaj rememoroj al lia infanaĝo. Eble la votantoj de Oskar-premioj ne ŝatas Netflix-on, sed ĝi fariĝas pli kaj pli valora alternativo – pro la pigreco de la grandaj filmkompanioj. *La Irlandano* estas kvazaŭ resumo de la vivoverko de Scorsese. Tamen Scorsese uzas ankaŭ plej novan diĝitan trukon, komputilan junigon de aktoroj. Iuj jam slange nomas tiun teknikon “irlandanigo”.

Iam ... en Holivudo


Iam ... en Holivudo estas la naŭa filmo de la reĝisoro Quentin Tarantino. Li anoncis pli frue, ke la deka filmo estu lia lasta. Tarantino havas siajn proprajn admirantojn, aliaj opinias, ke liaj filmoj estas tro masklismaj



vizioj. Ĝis nun li ankoraŭ ne gajnis Oskaron pro la plej elstara filmo. Ĉar tiu filmo temas pri Holivudo, kaj ĉar la juĝantoj kutime ja amas filmojn pri si mem, multaj konsideris ĝin probabla kandidato. Iuj ankaŭ rezonis, ke la akademio iam devus doni premion en tiu kategorio al Tarantino, kaj ke nun estas oportuna okazo, ĉar neniu scias ion pri la kvalito de lia deka kaj lasta filmo. Tamen la maljuna blankula juĝantaro ne tro aprezis ĉi tiun filmon pri la murdoj de la “Manson-familio”. Brad Pitt ricevis premion por plej bona malĉefa aktoro, kaj ili ankaŭ premiis la scenejan dezajnon.

Ĵokero

Kiam *Ĵokero* en 2019 gajnis la Oran Leonon ĉe la filmfestivalo de Venecio, estis eta sensacio, ĉar tie kutime oni ne donas premiojn al filmoj surbaze de bildstriaĵoj rakontoj. La reĝisoro Todd Phillips antaŭe ne faris rimarkendajn filmojn, sed famiĝis per sengustaj komediaĵoj kiel la trilogio *La Postebrio*. *Ĵokero* reelvokas la etoson de la 1970aj jaroj. Precipe *La Taksisto* de Martin Scorsese respeguliĝas en tiu filmo. Sed – se ni forprenas la elstaran aktoradon de Joaquim Phoenix kaj la kaptantan muzikon de Hildur Guðnadóttir, ĝi restas ne malbona, sed iom averaĝa filmo. *Ĵokero* volas pli ol ĝi kapablas.



1917

Ĉe la vetperantoj la filmo *1917* estis la favorato. Foje la tagoj antaŭ la Oskarceremonio similas al ĉevalkurado kun favoratoj kaj eblaj malgajnontoj. Tio ja montras, ke tio estas ĉefe komerca aranĝo. Estis tamen surprizo, ke ĝi gajnis nur malĉefajn premiojn, interalie, pro filmado kaj vidaj efektoj. Mi pensas, ke tio estas prava decido. La reĝisorado en *1917* kun du soldatoj, kiuj devas transdoni urĝan ordonon trans la frontoj dum la Unua Mondmilito, estas ne malbona, sed la bildoj ja estas spirrabaj.

“Internacia” signifas “neangla”

1917 estis produktita en Anglio, sed ĝi ne kvalifikiĝus por la internacia Oskar-premio. Tie konkuras nur filmoj, kiuj estas kaj ne-usonaj kaj ne el Anglalingvio. Ĉiu lando rajtas proponi po unu filmon. Jes, la ideo, ke oni en ĉiu lando produktas nur unu elstaran filmon dum unu jaro estas absurda. Tiu regulo havas strangajn efikojn. Aŭstralio proponis la filmon *Suprenforto* en la lingvoj kĥmera kaj taja pri homvendado, kaj Svedio sendis *Kaj poste ni dancis* en la kartvela lingvo. Sed la propono de Aŭstrio pri prostituitoj el Niĝerio en Aŭstrio ne estis akceptita, ĉar laŭ la takso de la Akademio oni tro multe parolas angle en ĉi tiu filmo. La akademianoj aplikis

la saman regulon al *Leonkoro* [Lionheart]. Jen stranga fenomeno: Niĝerio uzas la lingvon de la iamaj koloniistoj kiel komunan lingvon, kaj ĝuste tio nun malhelpas aliron al internacia famo.

Fine restis kvar kandidatoj por la kategorio “Internacia filmo”. *Miela lando* [Медена земја] el Makedonio estas hibrido inter drama kaj dokumenta filmo kaj konflikto inter tradicio kaj modernaj vivoformoj. Eble iom stranga propono por la plej elstara ne-angla filmo. Francio proponis *La mizeruloj* [Les Misérables] pri eksplodo de ribelo inter neblankaj junuloj en Pariza antaŭurbo. (Tamen mi opinias, ke *Portreto de juna virino en fajro* de Céline Sciamma estas la plej bona franca filmo de la lasta jaro.) Same taŭga estis la filmo *Doloro kaj gloro* [Dolor y gloria] de Pedro Almodóvar, kiu denove montras, ke li ankoraŭ povas krei kaptajn rakontojn. Mi ankoraŭ ne havis la eblecon por aprezi la polan filmon *Krista Korpo* [Boże Ciało], sed ŝajne la temo de la pola filmo similas al ĉies karesato kaj favorato: *Parazito*.

Ĉiuj amas *Paraziton*



ili elektis ne-anglalingvan filmon en ĉi tiu kategorio. Espereble ili ankaŭ estonte pensos pli tutmondece ol antaŭe.

La filmrikolto de la lasta jaro estis aparte riĉa, sed nuntempe la produktado de filmoj ĉesis pro la koronaviruso. En la sekvonta jaro ni ĝuos iom pli malabundan elekton kaj espereble nian sanon.

Post sia prezento ĉe la festivalo en Cannes *Parazito* [기생충, Gisaengchung] de la korea reĝisoro Bong Joon-ho konkeris la mondon. Bong petis, ke oni ne malkaŝu tro de la intrigo, kaj kompreneble mi respektas tiun deziron. La intrigo tute ne estas antaŭ-direbla. Ĉiam, kiam oni suspektas iun direktan en la intrigo, Bong ŝanĝas ĝin.

Temas pri du familioj, la malriĉa familio Kim, kiu vivas mizere en iu kelo, kaj la riĉa familio Park en vasta vilao sur la pinto de la urbo. La Kimoj iom post iom ennestiĝas ĉe la Parkoj. La Parkoj ne povas vivi sen la subtena asisto de la Kimoj, kaj la Kim'oj bezonas la monon de la Park'oj por pluvivi. Finfine ni demandas nin: kiu(j) estas efektive la parazito(j)?

La decido de la Akademio elekti *Paraziton* kiel la plej elstaran filmon de la jaro estis eta kaj aparte bonvena sensacio. Por la unua fojo

90 jaroj da plena vivo kun doloroj, sed ankaŭ kun feliĉo

Sigmond, Júlia. *Júlia Sigmond 90*. – Cluj-Napoca: Exit, 2019. – 128 p.

Ĉi tiu volumeto sin trovis sur mia skribotablo recenzota, kiam alvenis trista sciigo pri la forpaso de Júlia Sigmond en hospitalo de Piacenza (Italio). Ŝi sendis la libron kun la ena slipe, kiu tekstis:

Jen, mia lasta E-libreto!

Kun amikeco

2019, somero

kaj la manskibita nomo *Júlia*.

Sian lastan libron Júlia dediĉis al sia edzo Filippo Franceschi, Filippeto (konata en Esperanto kiel Sen Rodin), postvivinta ŝin je nur kvar tagoj. Finas la libron *La lasta letero*, verkita de Júlia okaze de la dekjara geedziĝa festotago, okazinta simbole 09.09.2009. Ili renkontiĝis en tre matura (metuŝelaĥa, kiel ŝi epitetas) aĝo kaj travivis kune siajn plej feliĉajn jarojn, montrante ekzemplon, ke “neniam oni perdu esperon”. Simbole, malfermas la volumon ŝiaj *Pensoj pri la amo*: “Se ni vivas en amo, ni sentas ties varmon, trankvilecon, certecon, ties bonodoron... Se ni vivas en amo, ni pli similas al elegante fluganta belega papilio, ol al pezmome lamanta, kolosa olda elefanto. Nia vivo estas multe pli facila, se ni povas ami...”


Ĉiuj verkoj de Sigmond, laŭ ŝia aserto, estas je 90% el la “vera vivo”, tial en ili estas priskribo de unuavide bagatelaĵoj, ja la vivo konsistas el ĉeno de ordinaraj agoj kaj eventoj, sed ankaŭ de homaj suferoj, kaj ankaŭ de sonĝoj, kiujn ŝi ŝatas rakonti. Ĉio ĉi estas vivo!

Júlia Sigmond 90 kiel vivresuma rakontokolekto enhavas mozaikon el la veraj vivokazintaĵoj, kiuj lasis en la memoro de Júlia profundajn spurojn (mi admiras ŝian memoron!). Multaj epizodoj en ŝiaj rakontoj estas ligitaj kun la familianoj: la gepatroj, kiujn ŝi nomas Dolĉapatrino kaj Dolĉapatro, la gefratoj. “Maljuna, oni ŝatas paroli pri la infanaj memoraĵoj”, – asertas Júlia.

Dise tra la rakontoj oni povas elpluki erojn por ŝia biografio. Ankaŭ pri sia esperantistiĝo, kiun kaŭzis korespondemo, kaj pri la verkado Júlia rakontas en “La skribistino” konsiderante sin ne verkistino, sed skribistino.

La modernaj teknologioj helpis Júlia daŭrigi korespond-kontaktojn per la reto, kaj iam ŝi komencis praktiki monatajn leterojn al siaj amikoj, rakontante pri diversaj vivokazaĵoj, pri siaj literaturaj planoj. Tiel en januaro 2018 ŝi estis zorgoplena pri malrapida progresado de rumana traduko de la romano *Libazar*, forte dezirante, ke ĝi aperu rumanlingve antaŭ ŝia morto. Fine de siaj monatleteroj ŝi kutimis aldoni iujn personajn vortojn, eĉ se nur “kiel vi kaj viaj familianoj fartas, kara Halina?”

Halina Gorecka



El la rusa poezio

***El la rusa poezio* / Kompilis Valentin Melnikov kaj Aleksander Korĵenkov; Tradukis el la rusa Valentin Melnikov; Antaŭparolo kaj biografiaj notoj de Aleksander Korĵenkov. – Kaliningrado: Sezonoj, 2020. – 90 paĝoj. – (Literatura suplemento al *La Ondo de Esperanto*, 2019).**

El la rusa poezio



Kiel suplemento al la nun bit-formata *LOdE* ĵus venis tre interesa 90-paĝa rikolto de 101 verkoj el 22 rusaj aŭtoroj, kolektitaj de Aleksander Korĵenkov kaj Valentin Melnikov kaj tradukitaj de ĉi lasta. Ne temas ja pri kompleta novaĵo, ĉar preskaŭ ĉiuj, krom malgranda aldono, jam aperis en la rubriko “Rusa Antologio” de *La Ondo de Esperanto* dum ok jaroj, ekde julio 2007 ĝis aŭgusto 2015. Tamen la kunigo, ordigita kronologie, donas belan vidon al la rusa poezio ekde la komenco de la 18a jarcento ĝis la lasta jardeko de la 19a. Recenzo pri tia verko fatale fontas el la situacio, ke la rusa literaturo estas ege malmulte konata en centr-okcidenta Eŭropo, kaj ke versaĵoj parkere

memorataj eĉ de rusaj bazlernejaj knaboj aspektas novaĵoj en la oreloj de ĝenerala publiko ĉe la alia flanko de Vistulo.

En antologio oni kutime supozas reprezenton, eventuale sintezan, de la pri-traktata periodo, kun la plej gravaj poemoj de la plej eminentaj verkistoj. Male, la kompilintoj elektis alian padon: mallongaj poeziaĵoj, kelkfoje preskaŭ nur splitoj, pli humuraj ol dramecaj, pli spritaj ol emociigaj, kaj, se eblas diri, ĉiam pozitivaj, edifaj. Amo aperas ĉefe ĝojiga, malofte turmenta, vivo montriĝas bela kaj aminda, preskaŭ neniam morna. Tio ne igas la antologion minora, sed kun apartaj trajtoj; kelkaj versaĵoj povas aspekti naivaj, sed animrefreŝigaj.

La antaŭparolo de la eldonisto Korĵenkov listigas periodojn de la rusa literaturo per la nomoj klasikismo, sentimentalismo, romantismo kaj realismo. Nu, por ĝenerala nekonanto de la rusa literaturo, tiuj nomoj ne ĉiam aspektas paralelaj al la literaturaj fluoj registrataj, ekzemple, en italaj aŭ hispanaj literaturaj tekstoj. Tial la verko estas aparte grava por konantoj de apenaŭaj nomoj de rusaj verkistoj: malfermiĝas, se ne tuta mondo, tamen larĝa fenestro al literaturo nur nebule konata ekster la rusa imperio aŭ influo.

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa printempa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>